# EVALUATING YOUR EPROOF

If you wish to make changes to your title metadata, click on the **See More Details** link in the Title Approval page. You'll then be able to edit and save changes to each section of metadata as needed.

**Recommended items to consider while evaluating your eProof:**

- Have your latest changes been incorporated?
- Is the pagination correct: odd numbered pages on the right/recto and even numbers on the left/verso?
- Are the page items and text positioned correctly on the page?
- Does your proof contain any spelling or grammatical errors or typos that need to be corrected?
- Is the ISBN correct and identical on the cover as well as the copyright page?
- Does the price on the cover match the price in the title metadata?

**Other considerations:**


- eProofs should not be used to evaluate color or print quality. A physical copy should be reviewed to evaluate this.
- The cropping of both cover and interior is approximate and does not account for the manufacturing variance of 1/16" (2mm)
- eProof file sizes are limited to 2GB. Where a file is close to this limit, pages are removed from the middle of the content to reduce the file size. Where this happens you will see a watermark appear at the bottom of each interior page confirming that pages have been removed. **Note**: this only appears in the eProof file and does not apply when the book is printed.

**Important note:** Pending production orders cannot be released for printing until your proof approval is completed.

**Need more?**
Read our eproof article at https://help.ingramspark.com/hc/en-us/articles/211155463-eProofs

# Eproof Hairlines

When reviewing eproofs and PDFs, you will often see hairlines. These thin, light colored lines are a result of a transparency flattener used by PDF creators and will sometimes appear around text boxes and masked images. Fortunately these hairlines are only visible in your PDF and will not print when the book is produced. These lines may appear on both cover and interior files.




Please note that while the above examples are most common, hairlines may also present themselves in additional ways. If you have any concerns, it's advisable to review your native working files to ensure the lines aren't present. Physical proofs are also available for review.

IngramSpark

Copyright 2001-2017 • Lightning Source • All Rights Reserved
4/28/17

Tiu ĉi teksto ne estas iu el la multaj omaĝaj elvokoj, per kiuj la komunista movado dum la stalina kaj poststalina tempo ĝis nuntempe pli aŭ malpli regule celebras tiun grandan eventon, la Oktobran Revolucion, sed ĝia provizora analizo kun la celo eltiri utilajn instruojn el ĝi, verkita de tiu homo, kiu plej elstare teorie kaj praktike estis organizinta ĝin, do temas pri analizo farita de la plej kompetenta persono mem.

Aktivuloj de la plej diversaj nuntempaj progresemaj movadoj rimarkos kun surprizo, kiom da sagacaj rimarkoj en tiu ĉi analizo priskribas la situacion de iliaj propraj grupoj.

La aŭtoro mem diras, ke la Oktobra Revolucio estos neniam kaj nenie ripetebla, sed la spertoj, kiujn la bolŝevistaj gvidantoj tiam kolektis, ne estas malutilaj por progresemuloj de hodiaŭ.

ISBN 978-2-36960-096-1
9 782369 600961

Leo Trocko: 1917 La instruoj de la Oktobro (1924)    MAS

# Leo Trocko

# 1917
# La instruoj de la Oktobra Revolucio

# (1924)

Monda Asembleo Socia (MAS)

5.50 x 8.50
216 mm x 140 mm

.187
4.7498mm

5.50 x 8.50
216 mm x 140 mm
Content Type: Black & White
Paper Type: Creme
Page Count: 78
File type: Internal

9 782369 600961

Perfect Bound Cover Template

Lightning Source

Document Size: 15" x 12"
305 x 381 mm

PROOF

# Leo Trocko

# 1917
# La instruoj de la Oktobra Revolucio

# (1924)

Monda Asembleo Socia (MAS)

PROOF

Leo Trocko

# 1917
# La instruoj de la Oktobro
# (1924)

PROOF

PROOF

Leo Trocko

# 1917
# La instruoj de la Oktobro
# (1924)

Monda Asembleo Socia (MAS)

PROOF

Leo Trocko

1917 La instruoj de la Oktobro (1924)

Esperantigita de Vilhelmo Lutermano

Monda Asembleo Socia (MAS)

Embres-et-Castelmaure

2017

ISBN 978-2-36960-096-1

PROOF

# Enhavtabelo

1917 La instruoj de la Oktobro....................................7
Necesas studi la oktobran renverson..........................7
„La demokratia diktatoreco de la proletaro kaj de la kampularo” Februaro kaj Oktobro..............................14
La batalo kontraŭ milito kaj patrujdefendo.................22
La aprilkonferenco..................................................27
La juliaj tagoj – La puĉo de Kornilov La demokratia konferenco kaj la antaŭparlamento............................33
Pri la Oktobra renverso...........................................40
La Oktobra Revolucio kaj la „leĝeco” de la sovetoj....53
Refoje pri la sovetoj kaj la partio en la proletara revolucio...........................................................65
Postparolo de la tradukinto......................................74

La Esperanta traduko estas farita laŭ la germanlingva teksto *Leo Trotzki: 1917. Die Lehren des Oktobers (1924)* troviĝanta en la retpaĝo de *Marxist's Internet Archive* kun html-markado de *Einde O'Callaghan*. -vl

PROOF

# 1917
# La instruoj de la Oktobro

## Necesas studi la oktobran renverson

Kvankam en la Oktobra Revolucio ni havis bonŝancon, ĝi ne havis bonŝancon en nia gazetaro. Ĝis nun ni posedas eĉ ne unu solan verkon, kiu donus tutan bildon de la oktobra renverso kaj emfazus ĝiajn plej gravajn politikajn kaj organizajn elementojn. Ne nur tio, eĉ la dokumentoj, kiuj rekte karakterizas la unuopajn stadiojn de preparado de la renverso kaj de la reala renverso – kaj ĉe tio la plej gravaj dokumentoj – ĝis nun ne estis publikigitaj. Ni eldonas multajn historiajn revoluciajn kaj partihistoriajn dokumentojn kaj materialojn, kiuj rilatas la tempon antaŭ la oktobra renverso, ni aperigas ne malmultan materialon pri la tempo kiu sekvis la oktobran renverson, sed al la vera Oktobro ni dediĉas multe malpli grandan atenton. Post la plenumita renverso ŝajnis al ni, kvazaŭ ni ne bezonus kalkuli kun la ebleco de ripeto. Estis kvazaŭ el la studado de la oktobra renverso, de la kondiĉoj de ĝia rekta preparo, plenumado kaj de la unuaj semajnoj de ĝia firmigo ni ne atendus rektan utilon por la urĝaj taskoj de la konstruado.

Kaj tamen tiu takso, kvankam ĝi estas ankaŭ duone senkonscia, estas granda eraro kaj krome nacie limigita. Kvankam ni ne venos en la situacion ripeti la Oktobran Revolucion, tio tamen ne signifas, ke ĉe tiu ekzemplo ni povas nenion lerni. Ni estas parto de la Internacio, sed la proletaro de ĉiuj ceteraj landoj ankoraŭ staras antaŭ la solvo de siaj „Oktobraj” taskoj. Krome en la lasta jaro ni havis sufiĉe konvinkajn ekzemplojn de tio, ke nia Oktobra sperto ankoraŭ ne enkorpiĝis eĉ en la plej maturaj komunistaj partioj en la Okcidento kaj ke ili konas eĉ ne la plej simplajn faktojn.

Ja eblas indiki, ke maleblas studi la Oktobron aŭ eĉ nur eldoni la dokumentan materialon, sen supren kirli malnovajn opinidiferencojn. Sed tia sinteno al tiu ĉi demando estus tro etanima. Kompreneble la opinidiferencoj en la jaro 1917 estis tre profundaj kaj tute ne hazardaj. Sed estus etanime, se nun, post kiam kelkaj jaroj pasis, oni volus forĝi armilojn kontraŭ tiuj, kiuj tiam eraris. Sed eĉ malpli allasebla estus, se pro tiuj subordigitaj konsideroj de persona karaktero oni volus prisilenti la plej gravajn problemojn kun internacia graveco de la oktobra renverso.

En la lasta jaro (1923) ni suferis du frakasajn malvenkojn; unue la partio pro doktrinece malĝustaj konsideroj maltrafis malofte favoran momenton por revolucia ago (ribelo de la kampuloj post la junia ribelo de Zankov) kaj poste, por korekti tiun eraron, enĵetis sin en la septembran ribelon, sen por tio krei la politikajn kaj organizajn kondiĉojn. La bulgara revolucio devis esti la antaŭludo de la germana. Malfeliĉe al la malbona antaŭludo sekvis eĉ pli malbona evoluo en Germanujo. Tie, en la dua duono de la lasta jaro, ni havis antaŭ niaj okuloj klasikan ekzemplon de tio, kiel oni povas maltrafi tute eksterordinaran revolucian situacion kun mondhistoria graveco. Kaj ree: nek la bulgara nek la germana eksperimento de la lasta jaro ĝis hodiaŭ trovis detalan kaj konkretan pritakson. La aŭtoro starigis ĝeneralan skemon de la evoluo de la lastjaraj okazaĵoj en Germanujo.[1] Ĉio, kio de tiam okazis, komplete konfirmis la ĝustecon de tiu skemo; alia klarigo estis provita de nenia flanko. Sed skemo ne sufiĉas al ni: ni bezonas prezenton, kiu entenas faktan materialon, montras precizan bildon de la lastjaraj okazaĵoj en Germanujo, kiu montras al ni la verfidelan kaŭzon de la katastrofa malvenko. Malfacilas analizi la okazaĵojn en Bulgarujo kaj Germanujo sen antaŭe fari politikan kaj

1 Vd *Osten und Westen* [Oriento kaj Okcidento], la ĉapitron *Am Wendepunkt* [Ĉe la turnopunkto] kaj *Auf welcher Etappe befinden wir uns?* [En kiu etapo ni troviĝas?].

taktikan prezenton de la Oktobra Revolucio. Eĉ ni mem ne havas klarecon pri tio, kion ni plenumis kaj kiel ni plenumis ĝin. Post la oktobra renverso ni supozis, ke la venontaj okazaĵoj en Eŭropo elfariĝos per si mem kaj krome en tiom mallonga tempo, ke eĉ tute ne eblus teorie formuli la oktobrajn instruojn. Sed montriĝis, ke per la neekzisto de partio kapabla gvidi proletaran ribelon, tiu ĉi mem fariĝis malebla. Per elementa ribelo la proletaro ne povas konkeri la potencon; eĉ en la alte kultura kaj industria Germanujo la elementa ribelo de novembro 1918 havis nur la sekvon, ke la potenco transiris en la manojn de la burĝaro. Poseda klaso kapablas konkeri la potencon elŝiritan el alia poseda klaso, per tio ke ĝi apogas sin sur sia riĉeco, sia „kulturo”, siaj sennombraj ligoj kun la malnova ŝtataparato. Sed por la proletaro ĝia partio anstataŭeblas de nenio.

Meze de la jaro 1921 envere nur komenciĝas la periodo de reale organeca konstruado de la komunistaj partioj („batalo por gajni la amason”, „unuecfronto”). Oni prokrastas la „oktobrajn taskojn” kaj samtempe ankaŭ la studadon de la oktobra ribelo. Sed la lasta jaro remetis nin antaŭ la taskojn de la proletara ribelo kaj venis la tempo publikigi ĉiujn dokumentojn, eldoni la materialon kaj alpaŝi la studadon de la aferoj.

Kompreneble ni scias, ke ĉiu klaso, ja eĉ ĉia partio, lernas precipe per siaj propraj spertoj; sed tio tute ne signifas, ke la spertoj de aliaj landoj, de aliaj klasoj kaj de aliaj partioj havas nur flankan gravecon. Sen studado de la granda franca revolucio, de la revolucio de 1848, de la Pariza Komunumo, ni neniam povintus plenumi la oktobran renverson, kvankam ni posedis nian propran sperton de 1905: ĉar eĉ tiu ĉi nia „nacia” eksperimento fariĝis per tio ke ni apogis nin sur la rezultojn de la antaŭaj revolucioj kaj plu kondukis ilian historian linion. La periodo de la kontraŭrevolucio estis por ni tempo, en kiu ni ekzamenis la rezultojn kaj instruojn de la jaro 1905. Male, por la esplorado de la venka revolucio de 1917 ni eĉ ne dediĉis dekonon da tia laboro. Certe:

ni ne vivas en la tempo de reakcio kaj de elmigrado. Sed kompense la rimedoj kaj fortoj, pri kiuj ni nun disponas, tute ne kompareblas kun tiuj, pri kiuj ni disponis en tiu malfacila tempo. Ni devas nur klare starigi la problemon de studado de la Oktobra Revolucio ene de la partio kaj ene de la tuta Internacio. Estas dezirinde, ke la tuta partio kaj speciale la juna generacio paŝon post paŝo komprenu la oktobran ribelon; la spertoj de tiu revolucio estas la plej profunda kaj plej ne refutata ekzameno de la pasinteco kaj malfermas larĝajn perspektivojn por la estonteco. La instruoj de la okazaĵoj en Germanujo en la lasta jaro estas por ni ne nur serioza admono, sed ankaŭ insista averto.

Certe direblas, ke ankaŭ intimeco kun la evoluo de la Oktobra Revolucio ankoraŭ ne donintus garantion por la venko de nia germana fratpartio. Sed kion utilas nun tia malgrava rezonado, kiu envere estas filistra kaj eĉ ne paŝon portas nin antaŭen. La studado de la Oktobro sole kompreneble ne kondukas al la venko en la aliaj landoj, sed povas estiĝi situacioj, en kiuj ĉiuj kondiĉoj por revolucio evidente ekzistas kaj mankas nur longvida kaj decidema gvidado. Tiu elkreskas el kompreno de la leĝoj kaj metodoj de la revolucio. Ĝuste tia estis la situacio lastjare en Germanujo, kaj la samo povas ankaŭ ripetiĝi en aliaj landoj. Por studi la leĝojn kaj metodojn de la proletara revolucio ĝis hodiaŭ ekzistas nenia pli grava kaj pli profunda fonto ol nia Oktobro-eksperimento. La gvidantoj de la aliaj eŭropaj komunistaj partioj, kiuj ne kritike kaj detale studis la historion de la Oktobra ŝtatrenverso, similas al armegvidantoj, kiuj sub la nunaj kondiĉoj preparas sin al nova milito, sen esti familiariĝintaj kun la spertoj sur strategia, taktika kaj teĥnika kampo. Tiaj militestroj kondukus siajn trupojn nepre en malvenkon.

La ĉefa rimedo de proletara ŝtatrenverso estas la partio. Jam surbaze de nia unujara sperto (de februaro 1917 ĝis februaro 1918) kaj kompletigite per la okazaĵoj en Finnlando, Hungarujo, Italujo, Bulgarujo kaj Germanujo, oni povas preskaŭ konsideri ĝin ĝenerale valida leĝo,

ke ĉe la transiro de la revolucia preparlaboro al la rekta batalo por la potencakiro eksplodas partikrizo. La krizoj ene de la partio ĝenerale aperas ĉe ĉiu serioza turnopunkto de la evoluo de la partio kiel ties anonco aŭ sekva fenomeno. Tio klariĝas per tio, ke ĉiu evoluperiodo de la partio havas siajn proprajn karakterizajn trajtojn kaj ke la laboro fariĝas laŭ certaj metodoj kaj kutimoj. Taktika novorientiĝo ĉiam signifas rompon kun la ĝistiamaj metodoj kaj kutimoj. En tio troviĝas la unua kaj plej rekta kaŭzo de ĉiaj enpartiaj frotiĝoj kaj krizoj.

> „Tro ofte okazis" – *skribis Lenino en julio de 1917 –*, „ke ĉe subitaj historiaj okazaĵoj eĉ la plej progresintaj partioj bezonis iom longan tempon por adaptiĝi al la nova situacio, ke ili ripetis malnovajn sloganojn, kiuj estis ĝustaj hieraŭ, sed hodiaŭ perdis ĉian sencon, kaj perdis ĝin same abrupte, kiel la historia ŝanĝo aperis." *(Volumo 14, parto 2, paĝo 12 de la rusa eldono de la Kolektitaj Verkoj de Lenino)*

Per tio estiĝas la danĝero: se la renverso venas tre subite kaj se la antaŭa periodo akumulis multajn konservativajn elementojn en la gvidaj organoj de la partio, tiam en la decida momento ĝi montriĝos nekapabla plenumi sian gvidan rolon, por kiu ĝi preparis sin dum multaj jaroj kaj jardekoj. La partio estas diserigata de krizoj, la movado preteriras ĝin – al malvenko.

La revolucia partio troviĝas sub la premo de fremdaj politikaj fortoj; en ĉiu periodo de sia ekzisto ĝi disvolvas aliajn rimedojn por rezisti al tiuj fortoj kaj kontraŭmeti sin al ili. Ĉe taktika novorientiĝo kaj ĉe la internaj frotiĝoj ligitaj kun ĝi, la forto kontraŭagi al tiuj detruaj eksteraj fortoj malgrandiĝas. Pro tio ekzistas la danĝero, ke internaj transformadoj de la partio, kiuj estiĝas pro la neceso de taktika novorientiĝo, iras trans la celon kaj servas al diversaj klasaj tendencoj kiel bazo. Per pli simplaj vortoj: partio, kiu ne tenas paŝon kun la historiaj

taskoj de sia klaso, estas en danĝero fariĝi malrekta instrumento de aliaj klasoj aŭ eĉ fakte fariĝas tia.

Dum la ĵus dirito ĝustas pri ĉia serioza interna taktika readaptiĝo, tio ĝustas eĉ pli pri la grandaj strategiaj ŝanĝoj. Sub taktiko en la klas-batalo ni komprenas – analoge al la milita metio – la arton konduki unuopajn operaciojn; sub strategio, la arton venki, tio signifas: la konkeron de la potenco. Ĝenerale ni ne faris tiun distingon ĝis la milito kaj en la epoko de la dua Internacio. Ni limigis nin al la nocio de la socialdemokrata taktiko. Tio ne estis hazardo: la socialdemo-krataro posedis parlamentan taktikon, sindikatan, distriktan, koope-rativan ktp. Sed la ideo kunigi ĉiujn ĉi fortojn, per kunigo de ĉiuj batalfortoj alkonduki la venkon kontraŭ la malamiko, en la realo ne estis pripensita dum la epoko de la dua Internacio, same kiel ankaŭ la tasko efektive konkeri la potencon ne aperis.

Nur la revolucio de 1905 por la unua fojo, post iom longa interrompo, metis la bazajn, strategiajn demandojn de la proletara batalo en la antaŭon de la scenejo. Per tio la rusaj revoluciaj socialdemokratoj, tio signifas la bolŝevistoj, akiris grandan meriton. La granda epoko de la revolucia strategio komenciĝas en la jaro 1917 unue por Ruslando, sed poste por la tuta Eŭropo. La strategio ne forigas la taktikon; la deman-doj de la sindikata movado, de la parlamenta agado ktp daŭre havas nian atenton, sed ili ricevas komplete novan signifon kaj fariĝas sub-ordigitaj metodoj de la kombinita batalo por la potenco. La taktiko submetiĝas al la strategio.

Se jam la taktika adaptiĝo plej ofte kondukas al internaj krizoj, kiom multe pli forte kaj daŭreme la frotiĝoj devas esti ĉe strategia turno-punkto! Sed la plej giganta ŝanĝo estas tiu, kiam la proletara partio de preparo, de propagando, de organizado, de agitado transiras al la rekta batalo por la potenco, al armita ribelo kontraŭ la burĝaro. Ĉio, kio en la partio ekzistas je nedecidemaj, skeptikaj, oportunistaj, menŝevistaj

elementoj, leviĝas kontraŭ la ribelo, serĉas por sia opozicio teoriajn formulojn kaj trovas ilin – ĉe la hieraŭaj malamikoj – la oportunistoj. Ni ankoraŭ havos la okazon plurfoje observi tiun fenomenon.

En la tempo de februaro ĝis oktobro de 1917, post agitada laboro sur plej larĝa bazo inter la amasoj sekvis montrado de la trupoj kaj ekzamenado de la frapforto antaŭ la decida batalo. En kaj post la Oktobro la batalforto estis provita per gigantaj, historiaj faroj. Se oni nun – kelkajn jarojn post la Oktobro de 1917 – volus okupiĝi pri la pritakso de la revolucio kaj speciale de la rusa kaj eviti la spertojn de la jaro 1917, tiam tio estus senfrukta skolastiko kaj tute ne marksisma analizo de la politiko. Estus same, kvazaŭ oni volus disputi pri la diversaj metodoj de naĝado, intense klopodante ĉe tio ne rigardi al la rivero, kie naĝantoj praktike aplikas tiujn metodojn. Ne ekzistas pli bona rimedo ekzameni la opiniojn pri la revolucio ol per ilia aplikado en la revolucio mem, same kiel ja ankaŭ la naĝmetodoj plej facile elproveblas per salto en la akvon.

# „La demokratia diktatoreco de la proletaro kaj de la kampularo”
# Februaro kaj Oktobro

La evoluo kaj fino de la Oktobra Revolucio donis mortigan baton al tiu skolastika parodio de la marksismo, kiu en la rusaj socialdemokrataj rondoj, precipe ĉe la grupo „Liberigo de la laboro” estis plej disvastiĝinta kaj tie ankaŭ plej elformulite esprimita. La senco de tiu pseŭdomarksismo konsistis en transformado de la kondiĉita kaj ĉirkaŭlimigita ideo de Markso *„La progresintaj landoj montras al la postrestintaj ties estontan evoluon”* en absolutan – kiel Markso nomis tion – superhistorian leĝon, kaj la adeptoj de la pseŭdomarksismo klopodis por bazi la taktikon de la laborista partio sur tiun leĝon. El tiu vidpunkto, la proletaro en Ruslando povis komenci la batalon por la potenco ne antaŭ ol la ekonomie pli evoluintaj landoj starigis „precedencan kazon”. Certe, ne refuteblas, ke ĉiu postrestinta lando en la historio de la pli progresintaj landoj trovas ion, kio indikas al ĝia propra estonta evoluo, sed tute ne povas temi pri tuta ripetado. Male, ju pli la kapitalisma ekonomio fariĝis mondekonomio, des pli aparte formiĝis la sorto de la postrestintaj landoj, en kiuj la elementoj de postrestinteco iris man-en-mane kun la lastaj atingoj de la kapitalisma evoluo. Engelso skribis en sia antaŭparolo al sia libro *Kampula milito*: *„En certa etapo, kiu ne bezonas estiĝi ĉie samtempe aŭ sur la samaj evoluŝtupoj, la burĝaro rimarkas, ke la proletara vojkunulo kreskas al ĝi super la kapon”*. Per la historia evoluo la rusa burĝaro, kaj ĝi pli ol ĉiu alia, spertis tiun fakton pli frue kaj en plena amplekso. Lenino jam ĵus antaŭ la revolucio de 1905 esprimis la apartecon de la rusa revolucio en la formulo „Demokratia diktatoreco de la proletaro kaj de la kampularo”. La formulo per si mem, tion montris la plua evoluo,

kompreneblis nur kiel etapo al la socialisma diktatoreco de la proletaro, kiu apogas sin sur la kampularo. La formulo de Lenino estis komplete revolucia, dinamika, ĝi estis rekte kontraŭa al la menŝevisma skemo; laŭ tiu skemo por Ruslando konsidereblis nur ripetado de la historio de la pli progresintaj landoj, en kiuj la burĝaro regas kaj la socialdemokratoj reprezentas la opozicion. En certaj rondoj de nia partio oni ĉe la lenina formulo emfazis ne la diktatorecon de la proletaro kaj de la kampuloj, sed ĝian demokratian karakteron, kiel kontraŭan al la socialisma karaktero, kio signifis proksimume: en Ruslando, postrestinta lando, penseblas nur demokratia revolucio. La socialisma revolucio laŭ tio devintus komenciĝi en la Okcidento: la vojo al la socialismo kondukas tra Anglujo, Francujo kaj Germanujo. Sed tia koncepto devis nepre transgliti al la menŝevismo, kaj tio ankaŭ evidente montriĝis en la jaro 1917, kiam la taskoj de la revolucio jam ne estis prognozoj, sed demandoj de faro.

Meze de reala revolucia situacio meti sin sur la starpunkton, ĝis la lastaj konsekvencoj trapensitan, de la demokratio kontraŭ la socialismo kiel tro frua fenomeno, signifis: politike interŝanĝi la proletaran pozicion kun la etburĝa kaj transiri al la maldekstra alo de la nacia burĝaro.

La Februara Revolucio, se oni konsideras ĝin memstara, estis burĝa revolucio. Sed kiel tia ĝi alvenis multe tro malfrue kaj ne havis persiston. Ĝi implikiĝis en kontraŭdiroj, kiuj tuj trovis sian esprimon en duobla regado kaj devis aŭ elkreski al proletara revolucio – kio ja okazis – aŭ remeti Ruslandon en ajnan burĝan-oligarĥan reĝimon, transformi ĝin en duonkoloniaĵon. La periodo, kiu sekvis al la Februara ŝtatrenverso, rigardeblas kiel tempo de firmiĝo kaj profundiĝo de la „demokratia” revolucio, aŭ kiel preparo de la proletara ŝtatrenverso. Sur la unua starpunkto troviĝis ne nur la menŝevistoj kaj la socialrevoluciuloj, sed ankaŭ certa parto de gvidaj elementoj de nia propra partio. La diferenco estis, ke la lastaj efektive strebis peli la demo-

kratan revolucion kiom eble plej maldekstren. Sed la metodo estis envere la sama: „premon" al la reganta burĝaro, kun la kondiĉo, ke tiu premo ne atingu trans la kadron de la burĝa demokratia reĝimo. Se tiu politiko estus superinta, tiam la revolucio estus irinta trans nian partion kaj ni spertintus fine ribelon de la laboristaj kaj kampulaj amasoj sen partia gvidado, per aliaj vortoj – la juliajn tagojn en giganta amplekso jam ne kiel epizodo, sed kiel katastrofo.

Evidentas, ke la rekta sekvo de tiu katastrofo estus la disbato de la partio. Tio montras la tutan amplekson de la opinidiferencoj.

La influo de la menŝevistoj kaj socialrevoluciuloj en la unua revolucia periodo ne estis hazarda: ĝi esprimis la ekziston de grandaj etburĝaj kaj nome kampulaj amasoj kaj samtempe montris la nematurecon de la revolucio. Al tiu nematureco, ĉe komplete novaj kondiĉoj, kaŭzitaj de la milito, la etburĝaj revoluciuloj dankis la gvidadon, aŭ la ŝajnan gvidadon, kiu konsistis en tio, ke ili defendis la historiajn pretendojn de la burĝaro je la potenco. Sed tio ankoraŭ ne signifas, ke la rusa revolucio devis iri nur la vojon, kiun ĝi iris de Februaro ĝis Oktobro de 1917. Tiu lasta vojo rezultis ne nur el la reciproka rilato de la klasoj, sed ankaŭ el la portempaj kondiĉoj kaŭzitaj de la milito. Per la milito la kampularo estis organizita kaj armita en formo de armeo de pluraj milionoj. Antaŭ ol la proletaro trovis la tempon organizi sin sub propra flago por tiri kun si la kampulajn amasojn, la etburĝaj revoluciuloj estis trovintaj naturan apogon en la kampula armeo indignanta pro la milito. Kun tiu milionojn forta amaso, de kiu unue ĉio dependis, la etburĝaj revoluciuloj efikis premon sur la proletaron kaj en la unua tempo tiris ĝin malantaŭ si. Ke la evoluo de la revolucio ankaŭ povintus esti alia, kaj tio kun la sama klasa konsisto, tion montris la okazaĵoj kiuj antaŭis la militon. En julio de 1914 Petrogrado estis skuata de revoluciaj alfrontiĝoj. Okazis rektaj stratbataloj. La gvidado de tiu movado sendube estis en la manoj de nia subtera partiorganizaĵo kaj de nia laŭleĝa partigazetaro. La bolŝevismo en rekta batalo kontraŭ

la likvidistoj kaj kontraŭ la etburĝaj partioj entute firmigis sian influon; la plua kreskado de la movado signifus antaŭ ĉio fortiĝon de la bolŝevista partio. Soveto de la laboristaj deputitoj de 1914 – se ĝi estus okazinta – plej verŝajne jam komence estintus bolŝevista. La vekiĝo de la kampara loĝantaro rekte aŭ malrekte okazintus per la urbaj bolŝevistaj sovetoj. Tio ne signifas, ke la socialrevoluciuloj estus tuj malaperintaj en la vilaĝoj, ne, supozeble la unua etapo de la revolucio okazintus sub la flago de la socialrevoluciuloj, sed ĉe la evoluo de ni indikita la socialrevoluciuloj estus devigitaj antaŭŝovi sian maldekstran alon por serĉi ligon kun la bolŝevistaj sovetoj en la urboj. La rezulto de la ribelo lastinstance, kompreneble ankaŭ en tiu kazo, estus dependa antaŭ ĉio de la opinioj kaj sinteno de la kampuloj. Maleblas kaj ankaŭ superfluas hodiaŭ esplori, ĉu la movado de la jaroj 1914-1915 kondukintus al venko, se la milito ne okazintus, kiu en la ĉeno de la evoluo enmetis novan kaj potencan ĉeneron. Sed multo indikas, ke, se la venka revolucio plu evoluintus sur la vojo, kiun la juliaj okazaĵoj de 1914 malfermis al ĝi, post forigo de la carismo venintus en la potencon la revoluciaj laboristaj sovetoj, kiuj per la maldekstraj „narodniki” (en la unua tempo) tirintus en sian tendaron ankaŭ la kampulajn amasojn.

La milito haltigis la etendiĝantan revolucian movadon, sed poste eksterordinare akcelis ĝin. En la giganta armeo la milito kreis por la etburĝaj partioj komplete novan, ne nur socian, sed ankaŭ organizan bazon, ĉar la aparteco de la kampularo konsistis en tio, ke ĝi mem, kiam ĝi estas revolucia, malfacile enordigeblas en organizaĵon. Per la armeo la etburĝaj partioj ricevis pretan organizaĵon, per kiu ili provis imponi la proletaron kaj tiri ĝin en la etoson de „patrujdefendo”. El tio klariĝas, kial Lenino tiom insiste elpaŝis kontraŭ la malnova slogano „Demokratia diktatoreco de la proletaro kaj de la kampularo”; ĉar sub la novaj kondiĉoj tiu slogano signifus dissolviĝon de la bolŝevista partio en la maldekstran alon de la bloko de patrujdefendo. Lenino

vidis la ĉefan taskon konduki la proletan avangardon el tiu marĉo. Nur sub tiu kondiĉo la proletaro – en la sekva etapo – povis fariĝi la kristaliĝa punkto por la laborantaj amasoj en la vilaĝoj. Sed kion fari pri la demokrata revolucio aŭ pli ĝuste pri la demokratia diktatoreco de la proletaro kaj de la kampuloj? Lenino donas senkompatan instruon al tiuj *„malnovaj bolŝevistoj”*, kiuj pli ol unufoje, diras li, *„en la historio de nia partio ludis la malĝojigan rolon meĥanike ripeti sensencajn kaj ellernitajn frazojn, anstataŭ studi la apartecon de la nova, vivanta realo.” „Ne al la malnovaj formuloj, sed al la nova realo oni devas adapti sin.”* (Kolektitaj verkoj, vol. 14, parto 1, p. 28-33) Lenino demandas: *„Ĉu tiu realo estas entute entenata en la malnov-bolŝevista formulo de kamarado Kamenev – 'la burĝa-demokratia revolucio ne estas finita'?” „Ne”*, respondas li, *„tiu formulo estas arĥaiĝinta. Ĝi ne plu taŭgas – ĝi estas mortinta – sencelaj estas la provoj revivigi ĝin.”*

Ĝustas, ke Lenino kelkfoje diris, ke la sovetoj de la laboristoj, soldatoj kaj kampuloj en la unua epoko de la Februara Revolucio ĝis certa grado realigis la regadon de la revolucia demokratia diktatoreco de la proletaro kaj kampuloj. Kaj tio estas ĝusta en la mezuro, en kiu tiuj sovetoj entute estis la potenco, sed, kiel Lenino plurfoje konstatis, tiuj konsilantaroj de la februara epoko estis nur limigita potenco. Ili subtenis la potencon de la burĝaro, per tio ke ili faris al ĝi nur duone opozician „premon”. Tiu duobla pozicio ankaŭ ne ebligis al ili transiri la limojn de demokratia koalicio de laboristoj, kampuloj kaj soldatoj. Tiom, kiom tiu koalicio apogis sin ne sur reguligitajn ŝtatajn rilatojn, sed sur la armitan potencon kaj sur la rektajn revoluciajn konsiderojn, ĝi tendencis, koncerne la formon de potenc-praktikado, al la diktatoreco, kvankam ĝi tute ne estis sufiĉe forta por ĝi. El tio rezultis la malstabileco de la tiamaj sovetoj. Ili estis metitaj antaŭ la decidon, ĉu perei aŭ efektive kapti la potencon. Sed ili ne povis kapti la potencon en sia eco kiel demokratia koalicio de laboristoj kaj kampuloj, kiu

konsistis el multaj partioj, sed nur per la proletara diktatoreco, gvidata de unu sola partio, kiu ankaŭ havas malantaŭ si la kampulajn amasojn, unue kun ties duonproletaraj tavoloj. Per aliaj vortoj: la demokratia laborista kaj kampula revolucio rigardeblis kiel nematura fenomeno, kiu ne taŭgis por la reala regado, kiel tendencon, ne kiel finan rezulton. La plua evoluo en la direkto de la potenckonkero devis nepre disŝiri la demokratian maskon kaj meti la grandegan plimulton de la kampuloj antaŭ la neceson sekvi la laboristojn, ĝi devis al la proletaro krei la eblecon realigi la klasan diktatorecon, kaj per tio prezenti la postulon de la tago: senkompate radikalan demokratiigon de ĉiuj sociaj rilatoj kaj la pure socialisman enrompon de la laborista ŝtato en la kapitalismajn propriet-rajtojn. Kiu sub tiuj kondiĉoj ankoraŭ kroĉis sin al la formulo „demokratia diktatoreco”, tiu devis apriore rezigni la potencon kaj konduki la revolucion en la sakstraton.

La baza demando, ĉirkaŭ kiu ĉiuj ceteraj grupiĝis, estis: ĉu batalo aŭ ne por la potenco? Ĉu oni transprenu aŭ ne la potencon? Jam el tio rezultis, ke ni havis antaŭ ni du konceptojn, kaj pli precize ne epizodan disiĝon de la opinioj, sed du tendencojn de klare principa graveco. Unu el tiuj tendencoj – la origina – estis proletara kaj moviĝis sur la vojo al la mondrevolucio; la alia, la „demokratia”, do etburĝa, lastinstance kondukis al subordigo de la proletara politiko sub la ĉiufojajn postulojn de la burĝa socio troviĝanta en transformado. Tiuj du tendencoj dum la tuta jaro 1917 koliziis ĉe ĉiuj iom gravaj demandoj. Ĝuste la revolucia epoko, do la tempo, kiam la akumulita forto de la partio estas rekte metita en cirkuladon, neeviteble devis malkovri la malsamecon de la opinioj. En pli aŭ malpli granda mezuro, kun iaj devioj, tiuj du tendencoj en la diversaj revoluciaj epokoj ĉiam denove montriĝos ankaŭ en la aliaj landoj. Se oni komprenas sub bolŝevismo edukadon, tian organizadon de la proletara avangardo, per kiu ebliĝas al ĝi armita akiro de la potenco, se oni konsideras la socialdemokration kiel reformisman opozician agadon en la kadro de la burĝa socio

kaj edukadon de la amasoj al agnosko de la netuŝeblo de la burĝa ŝtato, tiam fariĝas klare, ke ankaŭ ene de la komunista partio, kiu ja ankaŭ ne venas preta el la forno de la monda evoluo, la batalo inter la socaldemokrata tendenco kaj la bolŝevismo devas esprimi sin des pli akre kaj senmaskigite, ju pli la partio eniras en la periodon de la rekta revolucio, kie la demando de la potencakiro fariĝas la decida demando.

Ne pli frue ol la 4-an de aprilo, do post la alveno de Lenino en Petrogrado, la partio estis metita antaŭ la problemon de la potencakiro. Sed ankaŭ ekde tiu momento la linio de la partio estis tute ne unueca, kaj en ĝi tute ne ĉiuj estis sen duboj. Senrigarde la decidon dum la konferenco en aprilo de 1917, la rezistadoj kontraŭ la revolucia kurso – jen malkaŝe, jen senkonscie – daŭris dum la tuta prepartempo. La studado de la opinidiferencoj inter la februara revolucio kaj la firmiĝo de la oktobro havas ne nur eksterordinaran teorian intereson, sed ankaŭ praktike ĝi havas nemezureblan gravecon. Lenino en la jaro 1910 nomis la opinidiferencojn, kiuj montriĝis dum la dua kongreso en 1903, „*anticipation*”, tio signifas anticipon. Estas tre grave sekvi tiun disecon ekde ĝia evoluo en la jaro 1903 kaj eĉ pli frue, ekzemple ekde la „ekonomiismo”. Sed tiu studado ricevas sencon nur se ĝi fariĝas ĝisfine kaj aparte ankaŭ tra la epoko, kiam tiu opinidiferenco estis elmetita al la plej granda pruviĝo, do tra la Oktobra Revolucio.

En tiu ĉi verko ni ne povas meti al ni la taskon elĉerpe pritrakti ĉiujn stadiojn de tiu batalo. Sed ni opinias necesa plenigi almenaŭ parte la nekompreneblan breĉon, kiun nia literaturo montras pri tiu plej grava periodo en la evoluo de nia partio.

En la centro de tiu diseco staras, kiel jam dirite, la demando de la potencakiro. Tiu estas entute la trajto per kiu rekoneblas la karaktero de revolucia (kaj ne nur de revolucia) partio. Samtempe kun la deman-

do de la potencakiro en tiu periodo leviĝis kaj decidiĝis la problemo de la milito.

Ni volas rigardi ĉiujn demandojn en kronologia sekvo: la pozicion de la partio kaj de la partia gazetaro en la unua tempo post la forigo de la carismo ĝis la alveno de Lenino; la batalon por la tezoj de Lenino; la aprilan konferencon; la juliajn okazaĵojn; la puĉon de Kornilov; la demokratan konferencon kaj la antaŭparlamenton; la demandon de la armita ribelo kaj la akiron de la potenco (septembro-oktobro); la demandon de la socialista „unuec”-registaro.

La studado de tiuj disecoj donos al ni, kiel ni supozas, la eblecon fari konkludojn, kiuj povas esti gravaj ankaŭ por la ceteraj partioj de la Komunista Internacio.

# La batalo kontraŭ milito kaj patrujdefendo

La faligo de la carismo en februaro de 1917 kompreneble signifis grandan paŝon antaŭen. Sed se oni konsideras la Februaran Revolucion izolite, sen vidi ĝin kiel antaŭŝtupon al la Oktobro, tiam ĝi signifas nur, ke Ruslando proksimiĝis al la tipo ekzemple de la burĝa-revolucia Francujo. La etburĝaj revoluciaj partioj certe vidis en la februara revolucio ne burĝan revolucion, sed ankaŭ neniakaze ŝtupon por socialisma revolucio; por ili la revolucio havis propran „demokratian" signifon. Sur tio ili ankaŭ bazis siajn ideologiojn pri la revolucia patrujdefendo. Ili defendis ne la regadon de tiu aŭ alia klaso, sed la „revolucion" kaj la „demokration". Sed ankaŭ en nia propra partio la februara revolucio en la unua tempo sekvigis eksterordinaran perturbon de la politikaj perspektivoj. Envere la *Pravda* en la tagoj de marto estis multe pli proksima al la starpunkto de la revolucia patrujdefendo ol al la opinioj, kiujn Lenino defendis.

> *„Se armeo staras fronte al alia"*, *ni legas en iu el ĝiaj ĉefartikoloj*, „tiam la plej malsaĝa politiko estus tiu, proponi al unu el la armeoj demeti la armilojn kaj iri hejmen. Tia politiko ne estus politiko de paco, sed politiko de servuto, kiun libera popolo indigne rifuzus. Libera popolo restus sur la posteno, respondus al ĉiu kuglo per kuglo, al ĉia pafaĵo per pafaĵo. Tio estas sen ajna dubo. Ni devas ne toleri ajnan malorganizadon de la militaj fortoj de la revolucio." (*Pravda*, n-ro 9, 15-an de marto 1917)

Ĉe tio ne temas pri regantaj kaj subpremataj klasoj, sed pri la *„libera popolo"*; ne la klasoj batalas pro la regado, sed la libera popolo staras *„sur sia posteno"*. La ideo kaj ĝia formulado tute kongruas kun la platformo de la patrujdefendo. Plue tekstas en la sama eseo:

> „Ne la malorganizado de la revolucia kaj revoluciiga armeo kaj ne la senenhava formulo: 'For la militon' estas nia slogano. Nia slogano estas: Premo [!] al la provizora registaro kun la celo devigi ĝin malkaŝe elpaŝi

> antaŭ la mondan demokration [!], kun la provo [!] instigi [!] ĉiujn militantajn ŝtatojn senprokraste komenci intertraktadojn kaj interkonsiliĝi pri la rimedoj por ĉesigi la militon. Sed ĝis tiam ĉiu eltenu sur sia batalposteno" [!].

La ideo fari premon al la imperiistaj registaroj kun la celo „inklinigi" ilin al nobla paŝo, estis la programo de Kaŭcko kaj de Ledebour en Germanujo, de Jean Longuet en Francujo kaj de MacDonald en Anglujo – sed neniam bolŝevista programo. La eseo finiĝas ne nur kun ĝoja „*saluto*" de la fifama manifesto de la petrogradaj konsilantaroj *Al ĉiuj popoloj de la mondo* (tiu manifesto estas plena de spirito de la revolucia landodefendo), sed ankaŭ kun „*kontentiĝo*" konstatas la kongruon de la redaktejo kun la rezolucioj de du petrogradaj mitingoj, kiuj evidente staris sur la platformo de la patrujdefendo. Sufiĉas atentigi pri tio, ke unu el tiuj rezolucioj deklaras:

> „Se la germana kaj aŭstra demokratio ne aŭskultas nian voĉon *[tio signifas: la voĉon de la provizora registaro – L.T.]*, ni defendos nian patrujon ĝis la lasta sangoguto" (*Pravda*, n-ro 9 de la 15-a de marto 1917).

La citita eseo ne estas escepto. Male, ĝi tute precize esprimas la pozicion de la *Pravda* ĝis la reveno de Lenino. En la sekva numero de tiu gazeto, en la eseo: *Pri la milito*, ekz-e ja troveblas iaj kritikaj rimarkoj referencantaj la manifeston *Al ĉiuj popoloj de la mondo*, sed samtempe tie tekstas:

„Ne eblas ne bonvenigi la hieraŭan Alvokon de la petrogradaj laboristaj kaj soldataj konsilantaroj Al ĉiuj popoloj de la mondo, kiu entenas la postulon instigi la proprajn registarojn ĉesigi la militon." (*Pravda*, n-ro 10 de la 16-a de marto 1917)

Nu, kaj sur kia vojo la eliro el la milito estas serĉenda? Al tio la respondo tekstas:

> „La rimedo estas fari premon al la provizora registaro kun la postulo konsenti senprokraste eniri intertraktadojn pri paco” (samloke).

Tiaj kaj similaj citaĵoj kun kaŝita patrujdefendismo kaj maskita oportunismo fareblus abunde. Samtempe, eĉ semajnon antaŭe, Lenino, kiu ankoraŭ ne liberiĝis el sia zurika kaĝo, en siaj „Leteroj el malproksimo” (la plej multaj ne atingis ĝis la *Pravda*) furiozis kontraŭ ĉia koncedo al la patrujdefenduloj kaj oportunistoj.

> „Estas komplete neallasebla”, *skribis li la 8-an (21-an) de marto, kiam li ankoraŭ devis fari al si veran bildon de la revoluciaj okazaĵoj el la elementoj de la deformantaj kapitalismaj informfontoj*, „prisilenti al la popolo kaj al si mem, ke tiu registaro volas la daŭrigon de la milito, ke ĝi estas agento de la angla kapitalo, ke ĝi alstrebas la restarigon de la monarĥio kaj la firmigon de la potenco de la bienposedantoj kaj kapitalistoj.” (*Proletarische Revolution*, n-ro 7 (30), paĝo 299).

Kaj plue la 12-an de marto:

> „Direkti sin al tiu registaro kun la propono fari demokratian pacon, similus al la provo prediki karitaton al la bordelposedantoj” (samloke, paĝo 243).

En la sama tempo, kiam la *Pravda* propagandis la „premon” al la provizora registaro kun la celo instigi ĝin al demarŝo „antaŭ la tuta demokratia mondo” en la intereso de la paco, Lenino skribis:

> „Alpaŝi la Guĉkov-Miljukov-registaron kun la postulo baldaŭ kontrakti sinceran demokratian pacon, estas same malsaĝa kiel se brava vilaĝa pastro direktas sin al la bienposedanto kaj komercisto kun la propono komenci diotiman vivon, ami sian proksimulon kaj teni la dekstran vangon al tiu, kiu frapis al la maldekstra” samloke, paĝo 244s).

La 4-an de aprilo, tagon post sia alveno en Petrogrado, Lenino decide elpaŝis kontraŭ la pozicio, kiun la *Pravda* alprenis pri la milito kaj la paco.

> „Nenian subtenon al la provizora registaro, – skribis li – plenan malkaŝon de la tuta mensogeco de ĝiaj promesoj, speciale pri la rezigno je ĉia aneksado. Senmaskigi, anstataŭ alpaŝi tiun registaron, kiu estas kapitalista, per la neallasebla, iluzia 'postulo' ke ĝi ĉesu esti imperiista” (volumo 14, parto 1, paĝo 18).

Ne necesas diri, ke la alvoko de la 14-a de marto, kiun la *Pravda* tiom entuziasme salutis, de Lenino estis nomita „fifama” kaj „konfuza”. Estas altgrade hipokrite, se oni alvokas aliajn popoloj agi kontraŭ la financaj magnatoj, dum oni mem kun la propraj kapitalistoj faras koalician registaron. En *Projekto de platformo* Lenino diras:

> „ … la 'centro' ĵuras kaj alte asertas, ke ĝi estas marksista kaj internaciista, ke ĝi volas engaĝiĝi por la paco, por ĉia 'premo' al la registaro, egale pri kio temas, por ĉia 'postulo', kaj ke ĝi volas subteni la volon de la popolo je paco” (volumo 14, parto 1, paĝo 52).

Sed ĉu revolucia partio – tiel oni povus demandi ĉi tie – povas rezigni pri tiu premo al la burĝaro kaj al la registaro? Kompreneble ne! La premo al la burĝa registaro estas la vojo de reformoj. La marksista revolucia partio ne rezignas pri reformoj, sed la vojo de reformo taŭgas nur por duarangaj demandoj, sed tute ne, kiam temas pri la bazaj demandoj. Ne eblas per reformoj akiri la potencon. Ankaŭ ne eblas per „premo” instigi la burĝaron ŝanĝi sian politikon en demando, de kiu dependas ĝia sorto. La milito kreis revolucian situacion ĝuste per tio, ke ĝi senvalorigis la reformisman „premon”. Nun jam temis nur pri tio: aŭ kun la burĝaro iri ĝis la fino, aŭ mobilizi la amasojn kontraŭ ĝi, kun la celo elŝiri de ĝi la potencon. En la unua kazo oni

povis atendi de la registaro kelkajn koncedojn en la interna politiko kontraŭ la promeso de senlima subtenado de ĝia ekstera imperiista politiko. Pro tio la socialista reformismo ekde la komenco de la milito malkaŝe transformiĝis en socialistan imperiismon. Pro tio la reale revoluciaj elementoj estis devigataj alpaŝi la fondon de nova Internacio.

La starpunkto de la *Pravda* estis ne proletara-revolucia, sed demokrate eltenisma, kvankam en tiu lasta punkto ne konsekvence. Ni forigis la carismon, ni faras premon al la demokrata registaro, por ke tiu proponu la pacon al la popolo. Sed se la germana demokratio ne kapablas fari tian influon al sia registaro, tiam ni defendos la „hejmlandon" ĝis la lasta sangoguto. La demando de la paco ne estis komprenata kiel memstara tasko de la laborista klaso, kiu estas ankaŭ alvokita realigi ĝin super la kapo de la burĝa provizora registaro, kaj ĝi ne estis komprenata tiel, ĉar la konkero de la potenco fare de la proletaro estis rigardata ne kiel praktika revolucia tasko. Kaj tamen la du aferoj estas ne disigeblaj.

## La aprilkonferenco

La parolado de Lenino en la Finnlanda stacidomo pri la socialisma karaktero de la rusa revolucio trafis kvazaŭ bombo sur multajn gravajn partigvidantojn. La polemiko inter Lenino kaj la adeptoj de la „realigo de la demokratia revolucio” komenciĝis samtage. La preteksto por serioza disputo estis armita manifestacio, ĉe kiu oni donis la sloganon: „For la provizoran registaron!” Tiu cirkonstanco donis al kelkaj reprezentantoj de la dekstra alo la okazon akuzi Leninon je blankiismo: la faligo de la provizora registaro, kiu en tiu periodo estis subtenata de la plej multaj sovetoj, atingeblus nur per ekskludo de la plej granda parto de la laboruloj. Formale tiu riproĉo povus aspekti ne tute senprave, sed en la realo en la lenina aprilpolitiko ne estis eĉ la plej eta spuro de blankiismo. Por li la demando estis: kiom la sovetoj esprimis la realan opinion de la popolo, kaj ĉu la partio ne trompas sin, se ĝi orientas sin laŭ la plimulto de la sovetoj. La aprila manifestacio, kiu montriĝis pli maldekstra ol devis esti, servis por konstati, kia efektive estis la opinio de la amasoj kaj igis ekkoni la fortrilaton inter la amasoj kaj la soveta plimulto. La enketo kondukis al la ekkono, ke necesis longa preparlaboro. Ni spertis, kiom draste Lenino rifuzis la kronŝtadan delegitaron, kiam tiu komunikis al li sian decidon ne agnoski la provizoran registaron.

Tute alie la kontraŭantoj al la batalo por la potenco aliris tiun demandon. En la aprila partikonferenco kamarado Kamenev plendis:

> „En n-ro 19 de la Pravda de kamarado *[evidente estas celata Lenino – L.T.]* prezentiĝis rezolucio, kiu postulis eksigon de la provizora registaro. Tiu rezolucio estis presita antaŭ la lasta krizo; poste tiu slogano estis rifuzita kiel malorganizanta kaj nomata aventura. Tio signifas, ke niaj kamaradoj ion lernis el la krizo. Tiu ĉi rezolucio *[tio signifas: la rezolucio, kiun Lenino prezentis al la konferenco. – L.T.]* ripetas tiun eraron.” …

Tiu poziciiĝo estas altgrade signifa: Lenino, post enketi la situacion, retiris la postulon de tuja eksigo de la provizora registaro, sed nur por semajnoj aŭ monatoj. Li volis unue vidi, kiom kreskis la malkontento de la amasoj pri la oportunismo. Sed la opozicio rigardis tiun sloganon entute kiel eraron. En la portempa retiriĝo de Lenino ne estis eĉ la plej eta aludo pri tio ke li forlasis la antaŭe formulitan linion. Li ankaŭ ne deiris de la ideo, ke la demokratia revolucio ankoraŭ ne estis plenumita, sed sole nur konstatis, ke la amaso hodiaŭ ankoraŭ ne kapablas faligi la provizoran registaron kaj ke pro tio oni devas fari ĉion por kapabligi la laborantan klason morgaŭ faligi la provizoran registaron.

La tuta aprilkonferenco de la partio estis dediĉita ekskluzive al tiu fundamenta demando: ĉu ni iru al la konkero de la potenco en la nomo de socialisma renverso aŭ ĉu ni helpu (iun ajn) plenumi la demokratian revolucion. Bedaŭrinde la raporto de tiu aprilkonferenco ĝis nun daŭre ne estas presita; ĉar en la historio de nia partio apenaŭ okazis konferencoj, kiuj havis tiom da decida kaj rekta graveco por la sorto de la revolucio, kiel tiu ĉi aprilkonferenco de la jaro 1917.

La pozicio de Lenino estis: senlaca batalo kontraŭ la patrujdefendo kaj kontraŭ la patrujdefendistoj, akiro de la plimulto en la sovetoj, faligo de la provizora registaro, akiro de la potenco pere de la sovetoj, revolucia pacpolitiko, socialisma renverso en la interno kaj internacia revolucio ekstere. Male al tio, kiel ni ĉiuj scias, la opozicio defendis la starpunkton: Plenumado de la demokratia revolucio pere de premo al la provizora registaro, ĉe kio la sovetoj restu la „kontrolorganoj” de la burĝa registaro. El tio elkreskis tute alia, multe pli repaciĝema sinteno al la „landodefendo”.

Iu el la kontraŭuloj de Lenino rebatis en la aprilkonferenco:

> „Ni parolas pri la laboristaj kaj soldataj konsilantaroj kvazaŭ pri la organizanta centro de niaj fortoj kaj de nia potenco … sed jam la nomo montras, ke ili estas bloko

> de la etburĝaj kaj proletaraj fortoj, antaŭ kiu staras neplenumitaj burĝaj demokratiaj taskoj. Se la burĝa-demokratia revolucio finiĝus, tiam tiu bloko ne povus ekzisti kaj la proletaro gvidus la batalon kontraŭ la bloko … Sed ĉar ni agnoskas tiujn sovetojn kiel centron de nia organizaĵo, la burĝa revolucio ankoraŭ ne finiĝis; ĝi ankoraŭ ne arĥaiĝis kaj mi kredas, ke ni ĉiuj devas agnoski, ke post la fino de tiu ĉi revolucio la potenco efektive transiros en la manojn de la proletaro" (parolado de kamarado Kamenev).

La senespera skemismo de tiu ĉi argumentado estas tute klara: sed la esenco ja troviĝas en tio, ke la „definitiva fino de tiu ĉi revolucio" neniam povas okazi, sen ke la potenco transiras en aliajn manojn. En la citita parolado la klasa karaktero de la revolucio estas komplete ignorata. Laŭ tio la taskoj de la partio rezultas ne el la reala grupiĝo de la potencrilatoj en la klasoj, sed el formala difino de la revolucio kiel burĝa aŭ burĝa-demokratia. Ni devas kuniri en la bloko kun la etburĝaro kaj praktiki la kontroladon de la burĝa registaro tiom longe ĝis kiam la burĝa revolucio estas definitive plenumita. Tiu skemo estas pure menŝevista. Post doktrineca limigo de la taskoj de la revolucio per tia nomado („burĝa" revolucio) maleblis ne alveni al politiko de kontrolado de la provizora registaro kun la postulo de paco sen aneksadoj ktp. Sub plenumado de la demokratia revolucio oni komprenis serion da reformoj, enkondukendaj sur la vojo de la leĝdonaj institucioj, ĉe kio la bolŝevistoj ludus la rolon de maldekstra alo. La slogano „ĉiun povon al la konsilantaroj" ĉe tio perdis ĉian enhavon. Neniu tiom konsekvence trapensis kaj esprimis tion kiom la mortinta Nogin, kiu ankaŭ apartenis al la opozicio kaj prezentis tion en la aprilkonferenco jene:

> „Dum la evoluo la sovetoj perdas ĉiujn plej gravajn funkciojn. Tuta vico da administraj funkcioj estas transdonataj al la urbaj kaj semstvo-organizaĵoj ktp. Se ni

> rigardas la pluan evoluon de la ŝtata konstruado, ni ne povas nei, ke devos okazi kreado de leĝdona institucio kaj plue de parlamento. Sekve, la plej gravaj funkcioj de la sovetoj formortas, sed per tio ne estu dirite, ke tiuj mortaĉas malhonore. Ili nur transdonas siajn funkciojn. La realigo de la respublika komunumo ne atendeblas ĉe tiuj sovetoj."

La tria oponanto fine defendis la starpunkton, ke Ruslando ankoraŭ ne estas matura por la socialismo.

> „Ĉu ni povas kalkuli kun la subteno de la amasoj, se ni eldonas la sloganon 'Proletara revolucio'? Ruslando estas la plej etburĝa lando de Eŭropo. Pro tio ni ne povas supozi, ke la amaso renkontos la socialisman revolucion kun komprenemo. Sekve oni nur povas diri: ju pli la partio defendas la socialisman starpunkton, des pli ĝi transformiĝos en propagando-klubon. La instigon al socialisma revolucio povas doni nur la Okcidento."

Kaj plue:

> „Kie leviĝas la suno de la socialisma ŝtatrenverso? Mi pensas, ke pro nia etburĝa nivelo la iniciato de la socialisma revolucio devas eliri ne de ni, ni ne havas la fortojn nek la objektivajn kondiĉojn por tio. En la Okcidento, male, tiu demando sonos simile kiel ĉe ni la demando de faligo de la carismo."

Ne ĉiuj kontraŭuloj al la lenina koncepto dum la aprilkonferenco venis al la sama konkludo kiel Nogin; sed ĉiuj, per la logiko de la faktoj, devis alproprigi al si tiun ekkonon kelkajn monatojn poste, kaj pli precize rekte antaŭ la Oktobra Revolucio. Aŭ gvidado de la amasoj en la proletara revolucio, aŭ la rolo de opozicio en burĝa parlamento, tia estis la demando, kiu leviĝis interne de nia partio. Estas klare, ke la dua pozicio en la realo estis menŝevista aŭ, pli ĝuste dirite, la pozicio,

kiun la menŝevistoj post la februara revolucio devis forlasi. Fakte la menŝevistaj novuloj dum multaj jaroj predikis, ke la venonta revolucio estos burĝa, ke la burĝa registaro de la revolucio povos plenumi nur burĝajn taskojn, ke la socialdemokrataro ne povos transpreni la taskojn de la burĝa demokratio, sed – *„preme ŝovante la burĝaron maldekstren”* – devos resti en la situacio de opozicio. Kun aparte laciga profundpensado Martinov disvolvis tiun temon. Ĉe la eksplodo de la burĝa revolucio en la jaro 1917 la menŝevistoj tre baldaŭ troviĝis en la registaro. El ilia tuta „principa” pozicio restis nur tiu politika ekkono, ke la proletaro ne rajtas kuraĝi aliri la potencon. Sed nun estas tute klare, ke tiuj bolŝevistoj, kiuj kulpigas la menŝevistojn je ministrismo, sed samtempe elpaŝis kontraŭ la akiro de la potenco fare de la proletaro, en la realo proksimiĝis al la antaŭrevolucia starpunkto de la menŝevistoj.

La revolucio kaŭzis politikajn deŝovojn en du direktojn: la dekstruloj fariĝis kadetoj[2], la kadetoj devige fariĝis respublikanoj en forma moviĝo maldekstren; la socialrevoluciuloj kaj menŝevistoj fariĝis la reganta burĝa partio, moviĝo dekstren. Tiel la burĝa socio provis krei al si novan potenc-pozicion de konstanteco kaj de ordo. Samtempe kun la transiro de la menŝevistoj el la formale socialista pozicio al la vulgare demokratia, la dekstra alo de la bolŝevistoj transiris al la formale socialista, t.e. al la ĝis tiam menŝevista pozicio. Tiu sama transiro okazis ankaŭ en la demando pri la milito. La burĝaro, escepte de kelkaj doktrinuloj, ĝislace defendis la formulon: pacon sen aneksoj kaj kompensaĵoj. Ĝi povis fari tion des pli facile, ĉar la atendoj je aneksadoj estis tre malgrandaj. La menŝevistoj kaj socialrevoluciuloj en la cimervalda senco[3], kiuj estis kondamnintaj la francajn socialis-

2 „Kadetoj” – mallongigita (laŭ la unuaj literoj) nomo de la partio de konstitucia demokratio (burĝa liberalista partio en la antaŭrevolucia Ruslando) -vl

3 Laŭ la cimervalda manifesto, verkita de Trocko kaj aprobita de la Cimervalda Konferenco. Vd Leo Trocko: La Cimervalda Manifesto

tojn pro ilia defendo de la kapitalisma-respublika patrujo, fariĝis mem patrujdefendistoj, tuj kiam ili sentis sin en burĝa respubliko: ili ŝovis sin de la pasive internaciisma starpunkto al la aktive patriotisma. Samtempe kun tio la dekstra alo de la bolŝevista partio alprenis la pasive internaciisman starpunkton: „premon” al la provizora registaro kun la celo: demokratia paco „sen aneksoj nek kompensaĵoj”.

Tiel dum la aprilkonferenco disfalis la formulo de la demokratia diktatoreco de la proletaro kaj kampuloj. Teorie kaj politike rezultis du malamikaj konceptoj: la demokratia, kiu estis maskita per socialistaj frapvortoj, kaj la socialrevolucia aŭ la envere bolŝevisma, la lenina.

---

(MAS-libro n-ro 183). -vl

# La juliaj tagoj – La puĉo de Kornilov La demokratia konferenco kaj la antaŭparlamento

La decidoj de la aprilkonferenco kondukis la partion principe sur la ĝustan vojon, sed la diseco ĉe la gvida tavolo de la partio restis senŝanĝa kaj ne estis likvidita de ĝi. Male, la diseco profundiĝis per la fluo de la okazaĵoj, alprenis pli konkretajn formojn kaj atingis la plej grandan akrecon en la decida momento de la revolucio, en la oktobraj tagoj.

La provo, iniciatita de Lenino, fari manifestacion la 10-an de junio, estis kondamnata kaj prezentata kiel aventuro, de la samaj kamaradoj, kiuj ankaŭ malkontentis pri la decidoj en aprilo,

La manifestacio la 10-an de junio ne okazis, pro malpermeso de la soveta kongreso. Sed la 18-an de junio la partio ricevis la kontentigon; ĉar la ĝenerala petrograda manifestacio, kiu okazis verŝajne pro sufiĉe malprudenta iniciato de la oportunistoj, okazis preskaŭ nur sub bolŝevistaj sloganoj. Sed ankaŭ la registaro volis fari ion kaj komencis la idiote facilaniman antaŭenmarŝon ĉe la fronto. Tio estis decida momento. Lenino avertis la partion kontraŭ malprudentaj paŝoj. La 21-an de junio li skribis en la *Pravda*: *„Kamaradoj, ribelo estus nun maltaŭga. Nun necesas transvivi komplete novan epokon de nia revolucio.”* (Volumo 14, parto 1, paĝo 276) Sed venis la juliaj tagoj, la mejloŝtonoj sur la vojo de la revolucio, sed ankaŭ sur la vojo de enpartiaj disputoj.

En la julia movado la propriainiciata agado de la petrogradaj amasoj ludis la decidan rolon. Sed estas eksterdube, ke Lenino en julio demandis sin: Ĉu la tempo ne jam alvenis? Ĉu la opinio de la amasoj ne jam kreskis super la sovet-konstruaĵon? Ĉu ni ne devas timi ke ni, hipnotizitaj de la leĝeco de la sovetoj, ne sampaŝas kun la opinio de la amasoj kaj eĉ povas esti disigitaj de ili? Estas tre verŝajne, ke unuopaj pure militaj agadoj en la juliaj tagoj estis faritaj laŭ instigo de kamaradoj, kiuj estis honeste konvinkitaj agi en la senco de Lenino. Sed Lenino diris poste: *„En julio ni faris multajn stultaĵojn.”* Sed en la

realo ankaŭ tiu atako kondukis al larĝe farita enketado sur pli alta etapo de la movado. Ni devis unue retropaŝi, fari malfacilan retropaŝon. La partio, tiom kiom ĝi okupiĝis pri preparo de la potencakiro, vidis kun Lenino en la juliaj eksperimentoj nur epizodon, en kiu ni multekoste aĉetis kontakton kun la malamikaj fortoj, sed kiu ne povis influi la ĉioman linion de nia evoluo. Tiuj kamaradoj, kiuj poziciiĝis malamike al la politiko direktita al la potencakiro, vidis en la juliaj tagoj malutilan aventuron. La mobiliziĝo de la dekstraj fortoj de la partio fortiĝis, ilia kritiko fariĝis pli decidema. Lige kun tio, ankaŭ la tono de la defendo ŝanĝiĝis. Lenino skribis:

> „Ĉio ĉi lamentado, ĉiuj ĉi pripensadoj – ĉu oni ne partoprenu en la provo de paca kaj kohera konstruado kontraŭ la superleĝeca malkontento kaj indigno de la amasoj? – kondukas aŭ al renegateco, se ili devenas de la bolŝevistoj, aŭ estas kutima fenomeno ĉe la etburĝo, kiun kaŭzas pura angoro kaj lia senhelpeco.” (volumo 14, parto 2, paĝo 28)

La vorto „*renegateco*” en tiu kunteksto montris la tutan tragedion de la diseco. Poste oni renkontas tiun malican vorton oftege kaj ĉiam pli oftege.

La oportunisma pozicio pri la potencdemando kaj pri la milito kompreneble devis sekvigi ankaŭ tian pozicion pri la Internacio. Flanke de la dekstruloj oni provis instigi la partion partopreni en la Stokholma Konferenco de la socialpatriotoj. Lenino skribis la 16-an de aŭgusto:

> „La parolado de kamarado Kamenev en la centra Plenumkomitato la 8-an de aŭgusto lige kun la demando de la Stokholma Konferenco ne restu sen kontraŭdiro flanke de tuj bolŝevistoj, kiuj restis fidelaj al sia partio kaj siaj principoj.” (Volumo 14, parto 2, paĝo 56)

Kaj plue li skribis pri la frazo, ke oni en la Stokholma Konferenco intencas montri la flagon de la revolucio:

> „Ĉio ĉi estas malplena deklamado, en la spirito de Ĉernov kaj Ceretelli – ĝi estas evidenta mensogo. Ne la flago de la revolucio, sed la flago de la kompromiso, de la amnestio por la socialimperiistoj, de la intertraktadoj de la bankistoj pri la dispartigo de la aneksoj, jen la flagoj, kiuj montriĝos en Stokholmo.” (Samloke, paĝo 57)

La vojo al Stokholmo estis en la realo la vojo al la 2-a Internacio, precize same kiel la partopreno en la antaŭparlamento estis la vojo al la burĝa respubliko. Lenino estis por bojkoto de la Stokholma Konferenco kaj poste por bojkoto de la antaŭparlamento. Meze de la plej granda batalo li eĉ ne dum minuto perdis la celon el la vido: la kreadon de la nova komunista Internacio.

Jam la 10-an de aprilo Lenino proponas nomŝanĝon de la partio. Li forigis ĉiujn obĵetojn. Li nomis ilin argumentoj de inerto kaj de rutino. Li insistis: „Estas tempo por forĵeti la malnovan ĉemizon kaj vesti sin per pura vestaĵo.” Kaj tamen, la rezistado ĉe la pintoj de la partio estis tiom forta, ke tuta jaro devis pasi, en kiu Ruslando formetis la malpurajn vestaĵojn de la burĝa regado, antaŭ ol la partio povis decidi doni al si novan nomon kaj tiel reveni al la tradicio de Markso kaj Engelso.

En tiu historio de la nomŝanĝo de la partio esprimas sin simbole la rolo de Lenino dum la tuta jaro 1917: ĉar en la plej decida turnopunkto de la evoluo li devis seninterrompe en la interno [de la partio] fari lacigan batalon kontraŭ la hieraŭo nome de la morgaŭo. La rezistado de la hieraŭo, kiu elpaŝas sub la flago „tradicio”, en kelkaj momentoj atingas eksterordinaran akrecon.

La okazaĵoj de la Kornilov-puĉo, kiu sekvigis niafavoran deŝovon de la situacio, dumtempe mildigis la opinidiferencojn; ili mildigis, sed ne forigis ilin. Ĉe la dekstra alo en tiuj tagoj estis ne pretervidebla la tendenco proksimiĝi al la plimulto de la sovetoj surbaze de defendo de la revolucio kaj parte ankaŭ de defendo de la hejmlando. Lenino komence de septembro reagis per letero al la Centra Komitato:

> „Miaopinie tiuj falas en senprincipecon, kiuj engaĝiĝas por 'landa defendo'[4] aŭ (same kiel aliaj bolŝevistoj) por la bloko kun la socialrevoluciuloj kaj por subteno de la provizora registaro. Tio estas fundamenta eraro, tio estas – senprincipeco. Ni povas fariĝi adeptoj de la landa defendo nur tiam, kiam la proletaro transprenis la potencon."

Kaj plu:

> „Subteni la registaron Kerenskij ni eĉ nun ne rajtas, tio estus senprincipeco. Oni demandos: ĉu oni ne batalu kontraŭ Kornilov? Kompreneble jes! Sed tio ne estas la samo: tie ekzistas limo, kiun kelkaj bolŝevistoj transiras, ĉe kio ili falas en oportunismon, per tio ke ili lasas sin forŝiri de la okazaĵoj." (Volumo 14, parto 2, p. 95)

La sekva ŝtupo en la evoluo de la opinidiferencoj estis la demokratia konferenco (de la 12-a ĝis la 22-a de septembro) kaj la el ĝi rezultinta antaŭparlamento (la 7-an de oktobro). La tasko de la menŝevistoj kaj socialrevoluciuloj konsistis en tio: ligi la bolŝevistojn per la soveta leĝeco kaj el tio fari burĝan parlamentan leĝecon. La dekstruloj favoris tiujn strebojn. Ni antaŭe jam vidis, kiel ili pensis la evoluon de la revolucio: la sovetoj cedas siajn taskojn al respektivaj organizaĵoj, al la urbaj reprezentaĵoj, al la komunumoj, al sindikataj ligoj, kaj fine al la leĝdona institucio, per kiu tiam la sovetoj malaperas el la scenejo.

4 Ĉi tie evidente oni forigis la nomojn, kio montriĝas el la plua frazkonstruo. – *Leo Trocko*

La vojo tra la antaŭparlamento devis direkti la atenton de la amasoj for de la sovetoj kiel „provizora” institucio, al la leĝdona institucio kiel la angulŝtono de la demokratia revolucio. Sed la bolŝevistoj en la petrogradaj same kiel en la moskvaj sovetoj estis jam plimultaj. Nia influo ankaŭ en la armeo kreskis ne nur ĉiutage, sed ĉiuhore. Baldaŭ jam ne temis pri starigo de sloganoj kaj konsidero de eblecoj, sed laŭlitere pri determinado de la vojo jam morgaŭ paŝenda.

La elpaŝoj de la jam tute ruiniĝintaj oportunistaj partioj dum la demokratia konferenco montris ilian malĝojigan banalecon. Sed nia postulo demonstre forlasi la konferencon, ĉar ĝi evidente estas pereonta, ĉe la tiam tamen ankoraŭ potencaj dekstraj elementoj en la gvidantaro trafis sur energian rezistadon. Tiu disputo estis la komenco de la batalo por la bojkoto de la antaŭparlamento. La 24-an de septembro, t.e. post la demokratia konferenco, Lenino skribis:

> „La bolŝevistoj devintus demonstre forlasi la konferencon, kiel proteston kaj ankaŭ por ne fali en la kaptilon lasi la atenton de la popolo devojiĝi for de la seriozaj demandoj.” (Volumo 14, parto 2, paĝo 144)

La debatoj ene de la bolŝevista frakcio en la demokratia konferenco pro la bojkoto de la antaŭparlamento, malgraŭ la relative malvasta limigo de la temo, havis eksterordinaran gravecon. En la realo temis pri la ekstere ankaŭ sukcesa provo de la dekstra alo meti la partion sur la vojon de la „daŭrigado” de la „demokratia revolucio”. Stenografaĵo de tiuj debatoj ne ekzistas, plej verŝajne tute ne ekzistis –, ĉiukaze ni ne disponas pri io tia. Ankaŭ iaj notoj miascie ne ekzistas. La eldonantoj de tiu ĉi verko trovis kelkajn nesufiĉajn notetojn en miaj paperoj. Kamarado Kamenev prezentis la argumentojn, kiuj poste pli klare kaj pli akre konsistigis la enhavon de letero de Kamenev kaj Zinovjev al la partiorgnizaĵoj (11-an de oktobro). Nogin trovis pli principan formuladon de la demando: „La bojkoto de la antaŭparlamento estas la

alvoko al ribelo, t.e. al ripetado de la juliaj tagoj.” Kelkaj aliaj kamaradoj deiris de la ĝenerala socialdemokrata parlamenta taktiko kaj diris proksimume:

> „Neniu kuraĝus mocii la bojkoton de la parlamento, sed oni proponas al ni bojkoti tian institucion, nur ĉar oni donis al ĝi la nomon antaŭparlamento.”

La fundamenta opinio de la dekstruloj konsistis en tio, ke la revolucio neeviteble kondukos de la sovetoj al la burĝa parlamentismo kaj ke la antaŭparlamento estas natura fenomeno en tiu evoluo, ke estas sensence rifuzi la kunlaboradon en la antaŭparlamento, ĉar oni ja preparas sin por okupi la maldekstrajn benkojn en la parlamento. Oni plenumu la demokratian revolucion kaj „preparu” sin por la socialisma. Sed kiel prepari? Per la instruoj de la burĝa parlamentismo, ĉar la pli progresintaj landoj montras al la postrestintaj ilian estontan formiĝon. Oni pensas la falon de la carismo sur revolucia vojo – kio ja ankaŭ kongruas kun la faktoj –, sed la konkeron de la potenco fare de la proletaro oni konceptas parlamente; ĝi devos okazi post sukcesa demokratiigo. Inter la burĝa kaj la proletara revolucio devas troviĝi multaj jaroj de demokratia regado. La batalo por eniri la antaŭparlamenton estis la batalo por la „eŭropigo” de la laborista movado, por la pli rapida enkonduko de tiu movado en la demokratian batalon por la „konkero de la potenco”, t.e. en la kanalon de la socialdemokratio. La konsisto de la frakcio en la demokratia konferenco, kiu havis pli ol cent membrojn, neniel distingiĝis de la konsisto en la tiutempaj partikonferencoj. La plimulto de la frakcio estis por eniri la antaŭparlamenton. Sole tiu fakto estis zorgiga, kaj Lenino ekde tiu momento ankaŭ senĉese alarmis. Dum la tagoj de la demokratia konferenco li skribis:

> „Estus la plej granda eraro kaj parlamenta kretenismo, se ni volus rigardi la demokratian konferencon kiel par-

> lamenton; ĉar eĉ se ĝi deklarus sin kiel parlamenton, kiel suverenan parlamenton de la revolucio, ĝi tamen en la realo povus decidi nenion: la decido troviĝas aliloke, en la laboristaj kvartaloj de Peterburgo kaj Moskvo." (Volumo 14, parto 2, paĝo 138)

Kiel Lenino taksis la partoprenon aŭ la nepartoprenon en la antaŭparlamento, tio montriĝas en multaj eldiroj, speciale el letero al la Centra Komitato de la 29-a de septembro, en kiu li parolas pri *„tiel kriantaj eraro"* de la bolŝevistoj, kiel *„la hontinda decido partopreni en la antaŭparlamento!"* Por li estis klare, ke tiu decido deiris de la samaj demokratiaj iluzioj kaj etburĝaj ŝanceliĝoj, kiujn li ĉiam kontraŭbatalis, per tio ke li kontraŭmetis al ili sian koncepton de la proletara revolucio. Ne estas vere, ke inter la burĝa kaj la proletara revolucio devas esti multaj jaroj. Ne estas vere, ke la sola aŭ fundamenta aŭ deviga lernejo por la preparo de la potenckonkero devas esti la parlamenta sperto. Ankaŭ ne veras, ke la vojo al la potenco kondukas tra la burĝa demokratio. Ĉio ĉi estas malplenaj abstraktaĵoj, doktrinaj skemoj, kies politika tasko estas kateni la proletaran avangardon je manoj kaj piedoj kaj transformi ĝin per la „demokratia" ŝtatmeĥaniko en opozician ombron de la burĝaro. Ĉar tio estas la socialdemokratio. La politiko de la proletaro gvidendas ne laŭ fiksa programo, sed nur de la realaj postuloj de la klasbatalo. Ankaŭ necesas ne eniri la antaŭparlamenton, sed organizi la ribelon kaj alŝiri al si la potencon. Ĉio cetera poste troviĝos. Lenino eĉ proponis la organizadon de eksterordinara partikongreso, dum kiu la bojkoto de la antaŭparlamento kiel baza postulo estu sur la tagordo. Ekde tiam li ripetis en ĉiuj leteroj kaj eseoj ĉiam nur sole tion: ne en la antaŭparlamenton, kiel „revolucian" voston de la oportunista bloko, sed sur la straton, al konkero de la potenco!

## Pri la Oktobra renverso

La neceso kunvoki la eksterordinaran kongreson ne montriĝis. La premo, kiun Lenino efikis, kondukis al maldekstriĝo de la fortoj, same en la Centra Komitato kiel ankaŭ en la frakcio en la antaŭparlamento. La bolŝevistoj la 10-an de oktobro eliris. En Petrogrado ekflamis konflikto inter la sovetoj kaj la registaro, kaŭzita de la forsendo de la bolŝevistaj trupopartoj al la fronto. La 16-an de oktobro oni fondis milit-revolucian komitaton kiel laŭleĝan sovetorganon de la ribelo. La dekstra alo de la partio strebis haltigi la iradon de la okazaĵoj. La batalo de la diversaj tendencoj ene de la partio kaj la batalo de la klasoj eniris la decidan fazon. La pozicio de la dekstra alo de la partio estas antaŭ ĉio plej komplete kaj ankaŭ plej principe prilumata en letero *Pri la aktuala situacio*, kiu portas la subskribojn de Zinovjev kaj Kamenev. En la letero, skribita la 11-an de oktobro, t.e. du semajnojn antaŭ la renverso kaj sendita al la plej gravaj partiorganizaĵoj, ili decide elpaŝas kontraŭ la armita ribelo. La decido de armita ribelo estis farita de la Centra Komitato. La letero avertas kontraŭ subtakso de la fortoj de la kontraŭulo, sed monstre subtaksas la fortojn de la revolucio kaj eĉ neas la batalemon de la amasoj (du semajnojn antaŭ la 25-a de oktobro!). Tie tekstas:

> „Ni estas firme kaj neskueble konvinkitaj, ke armita ribelo nun, en la aktuala momento, ne nur sigelus la sorton de nia partio, sed ankaŭ la sorton de la rusa kaj de la monda revolucio."

Sed se nenia ribelo kaj nenia potencakiro – kio devos okazi anstataŭ tio? La letero ankaŭ al tiu demando donas klaran kaj senambiguan respondon:

> „Per la armeo kaj la laboristoj ni tenos al la burĝaro la revolveron ĉe la tempio",

kaj sub tiu minaco ĝi ne povas neniigi la konstituciigan asembleon.

> „La ekspektoj de nia partio por la elektoj por la konstituciiga asembleo estas elstare bonaj; la influo de la

> bolŝevismo kreskas. Ĉe ĝusta taktiko ni povos ricevi trionon, kaj eĉ pli da seĝoj en la konstituciiga asembleo."

Ni do vidas, ke en la letero oni malkaŝe indikas la strebadon fariĝi influriĉa opozicio en la burĝa konstituciiga asembleo. Tiu pure socialdemokrata strebo estas maskita per jenaj pensaĵoj:

> „La sovetoj, kiuj enkreskas en la vivon, ne neniigeblas; nur sur ili ankaŭ la konstituciiga asembleo povas apogi sin en sia revolucia laboro. Ili kaj la konsilantaroj estas la kombinita tipo de la ŝtataj institucioj, kiun ni atingos."

Estas aparte interese kaj karakterize por la ĉioma koncepto de la dekstruloj, ke la teorio de la „kombinita ŝtatformo" 1½–2 jarojn poste estis ripetita de Rudolf Hilferding en Germanujo, kiu batalis same kontraŭ la potencakiro fare de la proletaro. La german-aŭstra oportunisto ne sciis, ke li faris plagiaton.

En la letero *Pri la aktuala situacio* oni kontestas la fakton, ke malantaŭ ni staris la plej granda parto de la rusa popolo, ĉe kio oni konsideras kaj taksas la plimulton pure parlamente.

> „En Ruslando estas por ni la plimulto de la laboristoj", *tekstas en la letero*, „kaj granda parto de la soldatoj; sed ĉio cetera estas duba. Ekzemple ni estas ĉiuj konvinkitaj, ke, se okazos elektoj por la konstituciiga asembleo, la plimulto de la kampuloj voĉdonos por la socialrevoluciuloj. Ĉu tio estas hazardo?"

En tia starigo de la demando troviĝas la baza eraro, la miskompreno de la fakto, ke la kampuloj ja havas grandan revolucian intereson kaj firman volon agi laŭ tiuj interesoj, sed ne posedas propran politikan starpunkton. Ili povas aŭ voĉdoni por la burĝaro, pere de ties social-

revolucia agentejo, aŭ aktive aliĝi al la proletaro. Ĝuste de nia politiko dependis, kiu el tiuj eblecoj realiĝos. Se ni iras en la parlamenton, por tie akiri opozician influon (trionon de la seĝoj aŭ pli), tiam ni ŝovas, preskaŭ meĥanike, la kampulojn en la situacion, en kiu ili serĉas la respektigon de siaj interesoj pere de la konstituciiga asembleo, kaj tion ne per la opozicio, sed per la plimulto. Inverse, la potencakiro de la proletaro tuj kreus la revolucian kadron por la batalo de la kampuloj kontraŭ la bienposedantoj kaj oficistoj. Se ni uzas la tiam ĉe ni en ĝuste tiu demando tiel kutimajn esprimojn, tiam en la letero la kampularo estas samtempe „trotaksata” kaj „subtaksata”. Subtaksataj estis la revoluciaj eblecoj (ĉe proletara gvidado), trotaksata la politika memstareco. Tiu duobla eraro, la sub- same kiel la tro-taksado de la kampularo samtempe, devenas unuflanke el la subtaksado de la propra klaso kaj de ĝia partio. Tio estas la vidpunkto, el kiu rigardas la socialdemokratio la proletaron. En tio troviĝas nenio neatendita. Ĉiuj nuancoj de la oportunismo lastanalize kondukas al malĝusta pritakso de la revoluciaj fortoj kaj de la eblecoj dormantaj en la proletaro.

Por pravigi la rifuzon de la potencakiro, tiu letero ankaŭ timigas la partion per la perspektivo de interna milito.

> „La amaso de la soldatoj ne subtenas nin ĉe militaj sloganoj, sed nur niajn pacstrebadojn. Se nin nun transprenus la potencon kaj pro la ĝenerala situacio alvenus al la devo fari revolucian militon, tiam la soldatoj nepre disiĝus de ni. Restus ĉe ni sendube la plej bonaj partoj de la soldata junularo.”

Tiu argumentado estas plej altgrade instrua. Ni vidas ĉi tie la decidajn konsiderojn, kiuj kondukis al la subskribo de la packontrakto de Brest-Litovsko. Sed ĉi tie tiuj argumentoj estas aplikataj kontraŭ la potenc-akiro. Estas klare, ke la pensoj skribitaj en la letero *Pri la aktuala situacio* eksterordinare faciligis al la samopiniantoj la akcepton de la brest-litovska packontrakto. Ni povas ĉi tie kontentiĝi per ripeto de

tio, kion ni aliloke diris: ne la provizora kapitulaco de Brest-Litovsko per si mem karakterizas la politikan geniecon de Lenino, sed la kunligo de la Oktobra Revolucio kun Brest-Litovsko. Tio ne forgesiĝu.

La laborista klaso luktas kaj kreskas en la konstanta konscio, ke la kontraŭulo estas pli forta; tio esprimiĝas en la ĉiutaga vivo ĉiupaŝe. La kontraŭulo havas la riĉecon, la potencon, ĉiujn rimedojn por pure ideologia influado, ĉiujn rimedojn de subpremado. La iom-post-ioma intimiĝo kun la ideo, ke la malamiko superas nin je fortoj, estas parto de la vivo kaj de la laboro de la revolucia partio en ĝia prepara epoko. La sekvoj de tiu aŭ alia malprudenta aŭ tro frua ago ĉiufoje plej kruele demonstras la forton de la kontraŭulo. Jen okazas momento, dum kiu tiu kutimo vidi la malamikon kiel la plifortulon, transformiĝas en la ĉefan malhelpon sur la vojo al la venko. La hodiaŭa malforteco de la burĝaro estas kovrata de la konscio pri ĝia hieraŭa forto. „Vi subtaksas la forton de la malamiko", tio estas la slogano, sub kiu ĉiuj kontraŭuloj al la armita ribelo kuniĝas.

> „Ĉiu, kiu volas paroli pri la armita ribelo", *tiel la kontraŭuloj skribis du semajnojn antaŭ la venko*, „estas devigata sobre pritaksi ĉiun eblecon, kaj ni konsideras nia devo diri, ke la nuna momento estas la plej danĝera en subtaksado de la malamiko kaj en trotaksado de la propraj fortoj. La potenco de la malamiko estas pli granda ol ŝajnas al ni. Petrogrado decidas, kaj ĝuste ĉi tie la malamikoj de la proletaro havas konsiderindajn fortojn: kvin mil junkrojn, kiuj estas elstare bone ekipitaj kaj organizitaj kaj kiuj, danke al sia klasa pozicio, ne timas la batalon; krome la stabon, la sturmtaĉmentojn, krome la kozakojn kaj konsiderindan parton de la garnizono, kiu troviĝas ĉirkaŭ Petrogrado. Krome la kontraŭuloj provos, helpe de la Centra Plenumkomitato, alkonduki trupojn el la fronto." (*Pri la aktuala situacio*)

Estas kompreneble, ke en interna milito, kie gravas ne nura nombrado de la batalionoj, sed la pritakso de ilia supozebla opinio, la pritakso de la fortrilatoj devas esti malfacila kaj nesufiĉa. Eĉ Lenino supozis, ke la malamiko en Petrogrado disponis pri konsiderindaj fortoj kaj pro tio pritaksis la eblecon komenci la ribelon en Moskvo, kie liaopinie ĝi okazos sen sangelverŝo. Tiaj eraroj en la antaŭdecido ne eviteblas, eĉ ĉe la plej favoraj kondiĉoj, kaj estas pli ĝuste ĉiukaze supozi malpli favoran situacion. Sed kio interesas nin en tiu ĉi kazo, estas la nekredebla trotaksado de la malamiko, ĝis kompleta distordo de la kondiĉoj en situacio, kie la malamiko en la realo jam ne disponis pri armita potenco.

Tiu ĉi demando, kiel la sperto en Germanujo pruvis, estas ege grava. Tiom longe, kiom la slogano de ribelo por la gvidantoj de la germana komunista partio havis precipe – se ne ekskluzive – agitan signifon, ili simple ignoris la demandon de la armita potenco de la malamiko (*Reichswehr*, faŝistaj taĉmentoj, polico). Al ili ŝajnis, ke ĉe la konstante kreskanta revolucia movado la milita tasko solviĝos per si mem. Sed kiam tiu problemo venis en la antaŭon de la scenejo, la kamaradoj, kiuj ĝis tiam konsideris la armitajn fortojn de la malamiko ne ekzistantaj, faris la novan eraron trotaksi tiujn fortojn. Ili kredis la indikojn pri la nombro de la armitaj fortoj de la burĝaro kaj sumigis ilin kun la fortoj de la *Reichswehr* kaj de la polico, rondigis la nombron supren (ĝis duona miliono kaj pli) kaj tiel ricevis kompaktan, ĝisdente armitan potencon, kiu estis tute sufiĉa por paralizi la proprajn klopodojn. Sendube la germanaj kontraŭrevoluciaj fortoj estis gravaj kaj antaŭ ĉio multe pli bone organizitaj kaj preparitaj ol niaj kornilovaj trupoj. Sed ankaŭ la aktivaj fortoj de la germana revolucio estas aliaj. La proletaro estas la plej granda nombro de la loĝantaro de Germanujo. Ĉe ni decidis, almenaŭ en la unua tempo, ĉiam Petrogrado kaj Moskvo: en Germanujo la ribelo havus tuj potencajn revoluciajn kernojn. Rigardate el tiu vidpunkto, la armitaj fortoj de la malamiko

havis tute ne ion tiel gigantan kiel en la statistika nombrado kun rondigo supren. Antaŭ ĉio oni devas kategorie rifuzi tiujn tendencajn kalkulojn faritajn kaj faratajn post la fiaskinta „germana Oktobro”. Ili servas por pravigi la politikon kiu kondukis al la fiasko. Nia rusa ekzemplo tiurilate havas ne anstataŭigeblan signifon. Du semajnojn antaŭ la sensanga venko en Petrogrado – ni povintus havi ĝin ankaŭ jam du semajnojn pli frue – la spertaj politikistoj de nia partio vidis la junkrojn kontraŭ ni, kiuj deziris batali kaj sciis batali, kaj la sturm-taĉmenton kaj la kozakojn kaj la plej grandan parton de la garnizono kaj la artilerion, kiu enfermis nin, kaj la alvenantajn trupojn el la fronto. Envere nenio ekzistis, absolute nenio. Ni imagu nun, ke en la partio kaj en la Centra Komitato venkintus la kontraŭuloj al la armita ribelo. Kiu tiam gvidintus en la interna milito, estas tute klare: la revolucio estus anticipe venkita, se ne Lenino kontraŭ la Centra Komitato alvokintus al la partio, kion li planis kaj ankaŭ sendube farintus, kaj sukcese. Sed ne ĉiu partio ĉe tiaj kondiĉoj disponas pri Lenino … Ne malfacilas imagi, kiel la historia prezentado tekstus, se en la Centra Komitato la tendenco venkintus, kiu rifuzis la batalon. La duonoficialaj historiistoj prezentus la okazaĵojn en oktobro de 1917 kiel frenezaĵon, donintus al la leganto gigantajn statistikajn indikojn pri la nombro de junkroj, de la sturmtaĉmentoj, de la artilerio kaj de la trupoj alvenantaj el la fronto, kaj prezentus tiujn fortojn kiel multe pli timigajn ol ili en la realo estis. Jen la instruo, kiun oni devus gravuri en la konscion de ĉiu revoluciulo!

La seninterrompa, senlaca premado de Lenino al la Centra Komitato en la monatoj septembro kaj oktobro estis kaŭzita de lia konstanta zorgo, ke ni povus preteratenti la ĝustan momenton. Sensencaĵo – diris la dekstruloj – nia influo konstante kreskos. Kiu pravis? Kaj kion signifas tio: preteratenti la ĝustan momenton? Ĉi tie ni alpaŝas la demandon, kiel la bolŝevista pritakso de la vojo kaj de la metodo de la revolucio estas aktiva, strategia kaj agoforta kaj staras kontraŭe al la

socialdemokrata, menŝevista, kiu estas tute plena de fatalismo. Kion signifas manki la momenton? La plej favora antaŭkondiĉo por ribelo ekzistas tiam, kiam la fortrilato deŝoviĝas niafavore. Kompreneble, ĉi tie temas pri la fortrilato ene de la konscio, tio signifas, de la politika superkonstruaĵo, sed ne pri la bazo, kiun en la epoko de la revolucio oni povas konsideri pli aŭ malpli neŝanĝebla. Sur la sama ekonomia bazo, ĉe sama klasa divido de la socio, la fortrilato ŝanĝiĝas, kaŭzata de la opinio de la proletara amaso, la detruo de ĝiaj iluzioj, la amasiĝo de politika sperto, la disfalo de la fido de la interaj klasoj kaj grupoj je la ŝtata potenco kaj fine de la malapero de tiu fido de tiu lasta je si mem. En la revolucio ĉio ĉi estas rapide okazantaj procezoj. La tuta taktika arto konsistas en kapto de la momento, en kiu la tutaĵo de la kondiĉoj estas por ni plej favora. La kornilova ribelo kreis tiujn antaŭkondiĉojn. La amasoj, kiuj estis perdintaj la konfidon al la ceteraj partioj de la soveta plimulto, vidis la konkretan danĝeron de kontraŭrevolucio. Ili kredis, ke nun la bolŝevistoj estas alvokitaj forteni tiun danĝeron. Nek la elementa disfalo de la ŝtatpotenco nek la alfluo de senpaciencaj amasoj al la bolŝevistoj povis esti daŭrema situacio, la krizo estis decidenda en tiu aŭ en la alia direkto. „Nun aŭ neniam” – ripetis Lenino.

Al tio la dekstruloj respondis:

> „Estus granda historia malvero, se oni volus meti la demandon de la transiro de la potenco en la manojn de la proletaro tiel: nun aŭ neniam. Ne! La partio de la proletaro kreskos, ĝia programo intimiĝas al ĉiam pli larĝaj popoltavoloj kaj nur unu cirkonstanco povus neniigi tiujn sukcesojn: se la partio sub la nunaj kondiĉoj kaptas la potencon. Kontraŭ tiom fatala politiko ni devas averte levi nian voĉon.” (Pri la aktuala situacio)

Tiu fatalisma optimismo estas plej detale esplorenda. Ĝi ne entenas nacian apartaĵon, nek distingiĝas per individueco. Saman tendencon ni

povis observi lastan jaron en Germanujo. Envere malantaŭ tiu atendema fatalismo kaŝas sin nedecidemo kaj eĉ nekapablo agi. Sed ĝi estas kaŝita malantaŭ la konsola prognozo: ni fariĝos ĉiam pli influaj, ju pli ni iras antaŭen, kaj nia forto ĉiam kreskos! Granda eraro! La revolucia forto de partio kreskas nur ĝis certa momento; poste la procezo povas transformiĝi en la malon. La atendo de la amasoj, pro la pasiveco de la partio, estas anstataŭata de elreviĝoj, dum la malamiko samtempe refortiĝas el sia paniko kaj eluzas tiun elreviĝon. Tian decidan turniĝon ni povis observi en Germanujo en 1923. Ni ne estis multe malproksimaj de simila turniĝo en la aŭtuno de 1917. Sufiĉus senage atendi ankoraŭ kelkajn semajnojn pli. Lenino pravis: Nun aŭ neniam!

> „Sed la plej decida demando – *tiel elpaŝas la kontraŭuloj al la armita ribelo kun sia lasta kaj plej forta argumento* – estas la jena: ĉu la opinio inter la laboristoj kaj soldatoj reale estas tia, ke ili vidas savon jam nur en strata batalo? Ne, tia la opinio ne estas. La ekzisto de bataletoso inter la profundaj tavoloj de la malriĉa loĝantaro de la ĉefurbo, bataletoso, kiu pelas ilin surstraten, povus ankoraŭ garantii, ke ilia ekzemplo kuntirus ankaŭ la grandajn kaj gravajn organizaĵojn (fervojon kaj poŝton), en kiuj la influo de nia partio estas malpli granda. Sed ĉar tia etoso eĉ en la fabrikoj kaj kazernoj ne ekzistas, estas memtrompo se oni volus sur tio konstrui iajn ajn atendojn.” (Pri la aktuala situacio)

Tiuj linioj, skribitaj la 11-an de oktobro, entenas apartan signifon, se oni memoras, ke ankaŭ la germanaj kamaradoj, por klarigi sian senbatalan retiriĝon en la lasta jaro (1923) referencis la malemon batali de la amasoj. La venko de la ribelo estas ĝuste tiam plej verŝajna, kiam la amasoj trovis la tempon por kolekti sufiĉe da spertoj, ne senkape ĵeti sin en la batalon, sed trankvile atendas kaj postulas decidan kaj inteligentan batalgvidon. En oktobro de 1917 en la

laboristaj amasoj, almenaŭ en la gvidaj tavoloj, la firma ekkono estis trabatinta al si la vojon, pro la sperto en la aprila ribelo, en la juliaj tagoj, en la kornilovaj bataloj, ke jam ne povis temi pri unuopaj elementaj protestoj, pri skoltado, sed pri la decida ribelo por kapti la potencon. La opinio de la amasoj laŭ tio fariĝis pli koncentrita, pli kritika kaj pli profunda. La transiro de vivoĝoja etoso, plena de iluzioj, al kritika konscio neeviteble malaltigas la rapidon de la revolucio. Tiu progresema krizo en la opinio de la amasoj supereblas nur per respektiva politiko de la partio, t.e. – antaŭ ĉio per ĝia preteco kaj ĝia taŭgeco gvidi la proletaran ribelon. Inverse partio, kiu dum longa tempo faris revolucian agitadon, por eltiri la amasojn el la influo de la oportunistoj, paralizos la aktivecon de la amasoj, kaŭzos en ili elreviĝojn kaj disfalon, neniigos la revolucion, se ĝi, post leviĝi per la konfido de siaj adeptoj, komencas ŝanceliĝi, rezonaĉi, elturniĝi kaj atendi. Post la fiasko ĝi tiam havas la eblecon pravigi sin per la mankanta aktiveco de la amasoj! La letero „Pri la aktuala situacio" kondukis nin sur tiun vojon. Bonŝance nia partio, sub la gvido de Lenino, decide likvidis tiajn tendencojn. Nur danke al tiu cirkonstanco ĝi venke plenumis la ribelon.

Post kiam ni nun karakterizis la kernan punkton de la politikaj demandoj ligitaj kun la preparo de la Oktobra Revolucio, kaj klopodis prezenti la opinidiferencojn, kiuj estiĝis sur tiu bazo, ankoraŭ restas al ni konstati la plej gravajn momentojn de la internpartia batalo en la lastaj decidaj semajnoj.

La decido pri la armita ribelo okazis en la Centra Komitato la 10-an de oktobro. La 11-an la plej gravaj partiorganizaĵoj ricevis la supre prezentitan leteron *Pri la aktuala situacio*. La 18-an de oktobro, t.e. semajnon antaŭ la ribelo, en la *Novaja Ĵizn* aperis letero de Kamenev:

> „Ne nur mi, sed ankaŭ kamarado Zinovjev kaj serio da ceteraj kamaradoj opinias ne allasebla, nun fari la ini-

> ciaton de armita ribelo; ĉar ĉe la nuna situacio, ĉe la nuna fortrilato kaj malmultaj tagoj antaŭ la sovetkongreso tio estus neallasebla kaj fatala por la proletaro kaj por la revolucio.” (*Novaja Ĵizn*, n-ro 156, 18-an de oktobro 1917)

La 25-an de oktobro en Petrogrado oni konkeris la potencon kaj kreis la sovetan registaron. La 4-an de novembro serio da respondecaj kunlaborantoj eksiĝis el la Centra Komitato de la partio kaj el la Konsilantaro de la popolkomisaroj kaj starigis la ultimatan postulon fari el la sovetaj partioj koalician registaron. *„Krom tiu ĉi”*, ili skribis, *„ekzistas nur unu ebleco: la starigo de pure bolŝevista registaro per la rimedoj de politika teroro.”* En alia dokumento de tiuj tagoj tekstas:

> „Ni ne povas porti la respondecon pri tiu fatala politiko de la Centra Komitato, kiu fariĝas kontraŭ la volo de granda parto de la proletaro kaj de la soldatoj, kiuj premas por plej rapida ĉesigo de la sangelverŝo inter la diversaj partoj de la demokratio. Pro tio ni demetas la mandaton kiel 'membroj de la Centra Komitato', por havi la rajton malkaŝe diri nian opinion al la amasoj kaj por alvoki la soldatojn kaj laboristojn per la slogano: 'Vivu la registaro de la sovetpartioj! Tujan interkompreniĝon sur tiu bazo!'” (Oktoberrevolution, Archiv der Revolution 1917, paĝo 407-410).

Do, tiuj, kiuj estis kontraŭ la ribelo ĉar kontraŭ aventuro, post kiam ili vidis la venkan procezon, engaĝiĝis por tio, ke la potenco estu redonota al la partioj, el kiuj la proletaro estis ĝin elŝirinta.

Kial nun la bolŝevista partio, kronita de sukceso, redonu la potencon al la menŝevistoj kaj socialrevoluciuloj – la disputo ja temis ĝuste pri la redono de la potenco! Al tio la opozicio respondis:

> „Ni konsideras tian registaron neceso, por malebligi pluan sangelverŝon, alvenon de malsatmizero, disbaton

> de la revolucio fare de adeptoj de Kaledin, krome, por certigi la kunvenon de la konstituciiga asembleo je la fiksita dato kaj por enkonduki politikon de paco, tiel kiel estis decidita en la Tutrusia kongreso de la laboristaj konsilantaroj kaj de soldataj delegitoj.” (*Oktober-revolution, Archiv der Revolution* 1917, paĝo 407-410)

Per aliaj vortoj, oni celis per la bolŝevista pordo trovi la vojon al parlamentismo. Ĉar la evoluo de la februara revolucio ne kondukis al la antaŭparlamento, male, al la oktobra renverso, la tasko, kiel la opozicio formulis ĝin, estis, kunlabore kun la menŝevistoj kaj social-revoluciuloj, liberigi la revolucion el la diktatoreco kaj konduki ĝin en la kanalon de la burĝa reĝimo. Do, temis pri io ne malpli grava ol pri likvido de la Oktobra Revolucio. Ne necesas diri, ke ĉe tiaj kondiĉoj ne eblas paroli pri interkonsento, pri kompromiso.

Sekvatage, la 5-an de novembro, publikiĝis kroma skribaĵo, kiu sekvis la saman celon:

> „Mi ne povas silenti pro konsidero de la partidisciplino, se mi devas observi, kiel marksistoj kontraŭ la saĝo kaj kontraŭ la elementaj potencoj ne volas kalkuli kun la objektivaj okazaĵoj, kiuj ja ĉe danĝero de disfalo ordonas al ni interkonsenton kun ĉiuj socialistaj partioj … Mi ne povas dediĉi min al personkulto, kiu dependigas la kuniradon kun ĉiuj socialistaj partioj de la ĉeesto de tiu aŭ de alia personeco en la ministrejo kaj per tio – kaj eĉ se nur dum minuto – daŭrigas la sangelverŝon.” (*Raboĉaja gazeta*, n-ro 204, 5-an de novembro 1917)

Fine la aŭtoro de tiu skribaĵo (Losovskij) klarigas la neceson engaĝiĝi por la partikonferenco, por ke solviĝu la demando

> „ĉu la Ruslanda Socialdemokrata Laborista Partio de la bolŝevistoj restos marksista laborista partio, aŭ ĉu ĝi definitive iros direkton, kiu havas jam nenion komunan

> kun la revolucia marksismo” (samloke, n-ro 204, 5-an de novembro 1917).

La situacio efektive ŝajnis senespera. Ne nur la burĝoj kaj bienposedantoj, ne nur la tiel nomata „revolucia demokratio”, en kies manoj troviĝis serio da pintaj organizaĵoj (la tutrusia ligo de fervojistoj, la armeaj komitatoj, krome la ŝtatoficistoj k.a.), sed ankaŭ la plej influaj membroj de nia propra partio, membroj de la Centra Komitato kaj de la Konsilantaro de la popolkomisaroj kondamnis la provon de la partio resti ĉe la stirilo por realigi sian programon. La situacio rigardeblis kiel senperspektiva, se oni rigardis nur la eksterajn kondiĉojn. Kio restis al ni? Akcepti la postulon de la opozicio signifus likvidi la oktobran renverson. Sed tiam estintus ja sensence, entute esti ĝin kaŭzinta. Restis nur unu ebleco: iri antaŭen kaj apogi sin sur la revolucian volon de la amasoj. La 7-an de novembro aperis en la *Pravda* la decida deklaro de la Centra Komitato de nia partio, verkita de Lenino kaj plena de revolucia pasio – vestita en klaraj, simplaj kaj netuŝeblaj formuloj – kalkulita por la larĝaj amasoj de nia partio. Tiu alvoko ankaŭ diskutas la dubojn pri la plua politiko de la partio kaj de ĝia Centra Komitato.

> „Hontu ĉiuj etkreduloj, ŝanceliĝuloj, dubantoj, ĉiuj, kiuj lasis sin timigi de la burĝaro, ankaŭ tiuj, kiuj subiĝis al la avertokrioj de la rektaj kaj malrektaj helpantoj de la burĝaro. En la petrogradaj, moskvaj k.a. laboristaj kaj soldataj amasoj ne rimarkeblas eĉ la plej eta ombro da ŝanceliĝemo. Nia partio staras kvazaŭ unu viro firme sur sia posteno kaj protektas la sovetpotencon kaj la interesojn de la laboruloj, antaŭ ĉio de la laboristoj kaj plej malriĉaj kampuloj” (*Pravda*, n-ro 182 (113), 20-an (7-an) de novembro 1917).

La plej danĝera kaj plej akra partikrizo estis superita, sed la batalo interne de la partio daŭris. La batallinio restis la sama; sed ĝia politika

graveco fariĝis ĉiam malpli granda. Ni trovis eksterordinare interesan konfirmon en raporto, kiun Urickij laŭtlegis dum la kunsido de la petrograda komitato de nia partio la 12-an de decembro okaze de la alvoko al la konstituciiga asembleo:

> „La opinidiferencoj en nia partio ne estas novaj. Ili estas la samaj tendencoj observeblaj ankaŭ pli frue pri la demando de la ribelo. Aktuale kelkaj kamaradoj vidas en la konstituciiga asembleo institucion, kiu devos kroni la revolucion. Ili staras sur la starpunkto de la filistroj kaj diras, ke ni faris maldecaĵojn. Ili kontraŭas, ke bolŝevistaj membroj de la asembleo kontrolu la kunvenon kaj la fortrilaton. Ili vidas pure formale kaj ne konsideras, ke el la rezulto de tia kontrolo oni ricevas superrigardon pri tio, kio en la konstituciiga asembleo okazas. Sed tio gravas; ĉar per tio ni havas la eblecon difini nian pozicion pri la konstituciiga asembleo. Ni opinias, ke ni devas batali por la interesoj de la proletaro kaj de la plej malriĉaj kampuloj. Sed kelkaj kamaradoj kredas, ke ni faras burĝan revolucion, kies fina celo devas esti la konstituciiga asembleo."

Per la malfondo de la konstituciiga asembleo finiĝas ne nur granda ĉapitro en la historio de Ruslando, sed ne malpli grava sekcio de nia partihistorio. Post superado de la internaj rezistadoj la partio de la proletaro ne nur konkeris la potencon, sed ankaŭ konservis ĝin.

# La Oktobra Revolucio kaj la „leĝeco” de la sovetoj

En septembro, en la tagoj de la demokratia konferenco, Lenino postulis la senperan transiron al la ribelo:

> „Por poziciigi nin pri la ribelo en la senco de Markso, tio signifas, kiel pri arto, ni devas, sen perdi tempon, tuj komenci starigi stabon de la revolucio, ĝuste dismeti la trupojn, konduki la plej fidindajn regimentojn al la plej gravaj punktoj, konkeri la fortikaĵon Peter-Paŭlo, malliberigi la generalstabon kaj la registaron kaj sendi tiajn trupojn kontraŭ la junkrojn kaj la sovaĝajn diviziojn, kiuj kapablas batali por sia celo kaj neniam donas al la malamiko la eblecon ekokupi la urbocentron. Ni devas mobilizi la armitajn laboristajn amasojn, konduki ilin al la lasta kaj decida batalo, tuj ekokupi la telefonajn kaj telegrafajn oficejojn, loki nian stabon ĉe la telefonstacioj, de tie starigi la ligojn kun ĉiuj regimentoj kaj fabrikoj, kun ĉiaj batallokoj ktp. Tion mi kompreneble celas nur kiel ekzemplon, nur por ilustri tion, ke oni en la donita momento ne povas esti fidela al la marksismo kaj al la revolucio, sen poziciigi sin pri la ribelo kvazaŭ pri arto” (volumo 14, parto 2, paĝo 140).

Tia starigo de la demando antaŭkondiĉas, ke la preparo de la renverso kaj tiu mem okazu fare de la partio kaj en ĝia nomo kaj nur la venko estu sigelita de la sovetkongreso. Sed la Centra Komitato ne akceptis tiun proponon. La ribelo estis kondukita en la kanalon de la sovetoj kaj en la agitado ligita kun la dua sovetkongreso. Tiu diseco postulas detalan klarigon, ĉar kvankam ĝi ne estas principa demando, sed pli ĝuste demando de teĥnika speco, ĝi tamen restas praktike tre grava. Ni jam prezentis, kun kia streĉita maltrankvilo Lenino kondutis pri la prokrasto de la ribelo. Pro la ŝanceliĝoj, kiuj montriĝis ĉe la pintoj de la partio, la agitado, kiu ligis la ribelon kun la dua sovetkongreso, devis por li signifi ne allaseblan prokrastadon, nedecidemon, kiu limis

al krimo. Al tiu penso Lenino ekde la fino de septembro ĉiam denove revenis.

> „Ĉe ni en la Centra Komitato kaj ĉe la pintoj de la partio – *li skribis la 29-an de septembro* – regas la tendenco kaj la opinio, prefere atendi la sovetkongreson ol tuj kapti la potencon. Tiu tendenco kaj opinio estas kontraŭbatalendaj."

Komence de oktobro Lenino skribas:

> „Heziti estas krimo, atendi la sovetkongreson [estas] infanludo per formalismo, perfido de la revolucio."

En la tezoj pri la peterburga konferenco Lenino diras la 9-an de oktobro:

> „La konstituciigaj iluzioj kaj la atendoj, kiujn oni faras pri la sovetkongreso, estas kontraŭbatalendaj. Oni devas rezigni pri la ideo nepre voli atendi la sovetkongresojn."

Fine, la 24-an de oktobro, li skribas:

> „Estas pli ol klare, ke nun envere ĉia prokrasto, ĉia malrapidigo de la ribelo egalas ĝian morton" – *kaj plue:* „La historio neniam pardonus prokraston al la revoluciuloj, kiuj hodiaŭ povas venki (kaj tutcerte hodiaŭ venkos), dum ili morgaŭ povas perdi multon, eĉ ĉion."

Ĉiuj ĉi leteroj, en kiuj ĉiu vorto estis forĝita sur la amboso de la revolucio, estas eksterordinare interesaj por la karakterizo de Lenino kaj la pritakso de la situacio. La ĉion trairanta baza ideo en ĝi estas la indigno, la protesto kaj la malestimo pri la fatalisma, atendema, socialdemokrata, menŝevisma sinteno al la revolucio. Kvankam la tempo per si mem estas grava faktoro en la politiko, ĝia graveco kreskas centoble en la milito kaj en la revolucio. Ne ĉion, kion oni povas fari

hodiaŭ, oni povas fari ankaŭ morgaŭ. Ribelo, la venko super la malamiko, la konkero de la potenco povas esti ebla hodiaŭ, sed morgaŭ esti malebla. Per la alproprigo de la potenco oni ŝanĝas la iradon de la historio – ĉu tiom grava okazaĵo povas dependi ankaŭ de 24 horoj? Jes, ĝi povas; kiam la evoluo de la aferoj kondukas al armita ribelo, tiam oni mezuras jam ne per la granda mezuro de la politiko, sed per la malgranda de la milito. Prokrasto je semajno, je tago, kaj eĉ je horo, sub certaj kondiĉoj povas alkonduki la fiaskon de la revolucio, la kapitulacon. Se ne estintus la lenina ekscitiĝo, la premo, la kritiko, tiu seninterrompa revolucia malfido, tiam la partio en la decida momento verŝajne ne forigintus la fronton; ĉar la rezistado en la pintoj de la partio estis tre granda, kaj de la gvidado en la milito same kiel en interna milito dependas ĉio.

Sed ankaŭ klaras, ke la preparoj al la ribelo estis kovrataj de la preparoj al la dua sovetkongreso, sub la preteksto, ke tiu estu protektota, kio donis al ni gigantan avantaĝon. En la momento, kiam ni, la petrograda soveto, protestis kontraŭ la ordono de Kerenskij sendi du trionojn de la garnizonaj trupoj al la fronto, ni fakte eniris la armitan ribelon. Lenino, kiu troviĝis ekster Petrogrado, ne rimarkis tiun cirkonstancon en ĝia tuta graveco. En ĉiuj siaj tiutempaj leteroj, kiom mi memoras, li ne mencias tiun okazaĵon eĉ per vorto. Kaj tamen la rezulto de la ribelo de la 25-a de oktobro estis du kvarone, se ne pli, decidita en la momento, kiam ni kontraŭstaris la forsendon de la trupoj, starigis la militrevolucian komitaton (la 16-an de oktobro), en ĉiuj trupopartoj kaj organizaĵoj nomumis niajn komisarojn kaj per tio komplete izolis ne nur la stabon de la petrograda militdistrikto, sed ankaŭ la registaron. Envere temis pri armita, kvankam sensanga, ribelo de la petrogradaj regimentoj kontraŭ la provizora registaro, ribelo kiu staris sub la gvido de la militrevolucia komitato kaj laŭdire havis la taskon protekti la duan sovetkongreson, dum kiu estu decidota la sorto de la registaro. La propono de Lenino komenci la ribelon en Moskvo, kie liaopinie ĝi

okazos sensange, devenis el la cirkonstanco, ke li el sia kaŝejo ne povis superrigardi la grandan ŝanĝegon okazintan ne nur en la opinio, sed ankaŭ en la organizaj interrilatoj, en la milita subordiĝo kaj hierarĥio post la „silenta” indigno de la ĉefurbaj garnizonoj meze de oktobro. Ekde la momento, kiam la batalionoj, laŭ ordono de la milit-revolucia komitato, rifuzis forlasi la urbon kaj ankaŭ ne forlasis ĝin, ni havis en la ĉefurbo venkan ribelon, kies konturojn la restaĵoj de la burĝa demokratia ŝtatformo apenaŭ ankoraŭ povis kaŝi. La ribelo de la 25-a de oktobro havis nur kompletigan karakteron, pro tio ĝi okazis ankaŭ tiom sendolore. Kontraste al tio, la batalo en Moskvo daŭris longe kaj sange, kvankam en Petrogrado la potenco de la popolkomisaro jam estis firmiĝinta. Evidentas, ke, se la ribelo estus komencita en Moskvo, ĝi alprenintus eĉ pli longan daŭron kaj ĝia rezulto estintus tre duba. Malsukceso en Moskvo havintus por Petrogrado la plej gravajn sekvojn. Venko eĉ tiam ne estis ekskludita, sed la vojo, sur kiu la eventoj reale okazis, montriĝis multe pli ŝpara, avantaĝa kaj venka.

Ni havis pli aŭ malpli la eblecon adapti la momenton de konkero de la potenco al la momento de la kunveno de la dua sovetkongreso nur ĉar la „silenta”, preskaŭ „laŭleĝa” armita ribelo almenaŭ en Petrogrado jam estis plenumita tri-kvarone, se ne eĉ naŭ-dekone. Ni nomas tiun ribelon „laŭleĝa” en la senco, ke ĝi rezultis el la „normala” situacio de duobla registaro, dum la regado de la oportunistoj. Ja en la petrograda soveto ofte okazis, ke la sovetoj kontrolis aŭ eĉ korektis la decidojn de la registaro. Tio estis kaŭzita de la konstitucio de la reĝimo, kiu en la historio estas nomata la kerenska. Kiam ni bolŝevistoj en la petrograda soveto komencis praktiki la potencon, ni nur daŭrigis la metodojn de tiu duobla registaro kaj profundigis ilin. Ni faris nia tasko la kontrolon de la formarŝad-ordono de la registaro. Per tio ni maskis la faktan ribelon de la petrograda garnizono, per la tradicioj kaj kutimoj de la laŭleĝa duobla registaro. Sed ne nur tion: per tio, ke ni en la agitado ligis la demandon de la potencakiro kun la momento de la dua sovet-

kongreso, ni disvolvis kaj profundigis la tradiciojn de la duobla registaro kaj per tio preparis la kadron de la soveta leĝeco por la bolŝevista ribelo en la tutruslanda skalo.

Ni ne endormigis la amasojn per konstituciaj sovetiluzioj, ĉar sub la slogano de batalo por la dua kongreso ni gajnis kaj tiel organize alproprigis al ni la armilojn de la revolucia armeo. Krome ni bonŝance sukcesis, en pli granda skalo ol ni estis atendintaj, peli niajn malamikojn, la oportunistojn, en la kaptilon de la leĝeco. Apliki politikan ruzecon estas ĉiam danĝere, sed speciale dum revolucio. Tute ne certas, ke oni trompas la malamikon, sed oni kaŭzas konfuzon en la amasoj, kiujn oni kondukas. Nia „ruzaĵo” sukcesis centelcente nur ĉar ĝi ne estis elkovita de strategiistoj, kiuj volis eviti la internan militon, sed nature fontis el la kondiĉoj de la progresanta disfalo ene de la oportunista reĝimo, el ties kriantaj kontraŭdiroj. La provizora registaro volis seniĝi je la trupoj de la garnizono. La soldatoj ne volis iri al la fronto. – Ni donis al tiu natura rifuzo politikan esprimon, revolucian celon, „leĝan” maskon. Per tio ni atingis maloftan unuecon ene de la garnizono kaj ligis ĝin kun la petrogradaj laboristoj. Inverse niaj kontraŭuloj, ĉe la senespero kaj komplikeco de sia situacio, emis akcepti la ŝajnon kiel realon. Ili volis esti trompataj kaj ni donis al ili tiun eblecon.

Inter ni kaj la oportunistoj la batalo temis pri la leĝeco. En la popola konscio la sovetoj estis la portantoj de la potenco, el la sovetoj devenis Kerenski, Ceretelli kaj Skrobelev. Sed ankaŭ ni estis ligitaj kun la sovetoj per nia ĉefa slogano: „Ĉiun potencon al la sovetoj!” La burĝaro devenigis sian juran fundamenton el la Dumao, la oportunistoj el la sovetoj. Ili intencis rekonduki ilin en la nenion. Sed ni volis transdoni al ili ĉian potencon. La oportunistoj ne kapablis forpreni la potencon el la sovetoj kaj poste provis fari ponton de ili al la parlamento. Tiucele ili kunvokis la demokratian konferencon kaj kreis la antaŭparlamenton. La partopreno de la sovetoj en la antaŭparlamento ŝajnis

aprobi tiun vojon. La oportunistoj provis kapti la revolucion per la kaptilo de la leĝeco, por poste konduki ĝin en la kanalon de la burĝa parlamentismo.

Sed ankaŭ ni havis intereson eluzi la sovetan leĝecon. Fine de la demokratia konferenco ni elŝiris el la kontraŭuloj la konsenton kunvoki la duan sovetkongreson. Tiu kongreso faris al ili multajn malfacilaĵojn: unuflanke ili ne povis rezisti kontraŭ la kunvoko sen rompi la socialistan leĝecon, aliflanke ili vidis, ke la kongreso, laŭ sia konsisto, ne alportos al ili multan bonon. Des pli decide ni elpaŝis por la dua sovetkongreso, kiel la reprezentado de la lando, kaj ni aranĝis niajn preparlaborojn tiel, ke ili samtempe servis ankaŭ al la subteno kaj protekto de la sovetkongreso, ĉar oni devis kalkuli kun atakoj flanke de la kontraŭrevolucio. Dum la oportunistoj devigis nin pri sovetleĝeco per la antaŭparlamento deveninta el la sovetoj, ni devigis ilin pri tiu sovetleĝeco per la dua kongreso de la sovetoj. La organizado de la armita ribelo sub la slogano: „Akiro de la potenco per la partio” estas unu afero; la preparo kaj posta efektiva realigo de la ribelo kun la slogano: „Defendo de la rajtoj de la sovetkongreso” estas io tute alia. La tempa proksimigo de la ribelo kaj de la dua sovetkongreso laŭ tio ne signifis, ke ni havis iajn, eĉ plej naivajn esperojn ke la kongreso povu per si mem decidi la demandon de la potenco. Tia fetiĉismo de la sovetformo estis al ni tute fremda. La tuta laboro necesa por konkeri la potencon, ne nur la politika laboro, sed ankaŭ la organiza kaj la milita, okazis en kreskanta rapido. La leĝa preteksto estis ĉiam la indiko de la okazonta kongreso, kiu devis alporti la solvon de la potencdemando. Ni faris la atakon sur la tuta linio, sed vekis la ŝajnon, kvazaŭ temus pri la defendo. Se la provizora registaro vere volintus defendi sin, ĝi devintus malpermesi la kongreson, per kiu ĝi donintus al sia kontraŭulo la por si malfavoran okazon por armita ribelo. Ni strebis meti la provizoran registaron en la plej aĉan situacion, kaj tiuj uloj efektive kredis, ke por ni temis pri la soveta

parlamentismo, pri la nova kongreso, el kiu nova rezolucio estiĝos pri la potencdemando, laŭ la ekzemplo de la moskvaj kaj petrogradaj sovetrezolucioj, laŭ kiuj la registaro, elvokante la antaŭparlamenton kaj la okazontan konstituciigan asembleon, povus demisii kaj meti nin en ridindigan situacion. Ke la pensadoj de la plej saĝaj inter la etburĝaj saĝuloj efektive moviĝis en tiu direkto, tion Kerenskij atestas en siaj memoraĵoj. Li rakontas, kiel en la nokto al la 25-a de oktobro, kiam la ribelo jam plene disvolviĝis, okazis akraj disputoj en lia kabineto kun Dan kaj aliaj. „Dan diris al mi”, rakontas Kerenskij, „ke ili estas multe pli bone orientitaj ol mi, kaj ke mi trotaksas la okazaĵojn, sub la influo de mia reakcia stabo.” Plue li klarigis, ke la rezolucio de la plimulto de la sovetoj, malagrabla por la „memamo de la registaro”, estas tute avantaĝa por la respubliko kaj grava por la „opiniŝanĝo de la amasoj”. La efiko jam „montriĝas”, tiel ke la influo de la bolŝevista propagando „rapide malgrandiĝos”. Aliflanke la bolŝevistoj – laŭ liaj vortoj – en intertraktadoj kun la reprezentantoj de la soveta plimulto deklaris sian pretecon cedi al la plimulto kaj „jam morgaŭ” fari ĉiajn disponojn por sufoki la ribelon, kiu „estiĝis sen ilia konsento, sen ilia aprobo”. Fine Dan memorigis pri tio, ke la bolŝevistoj „jam morgaŭ” (ĉiam morgaŭ!) malfondos sian militan stabon, kaj deklaris al mi (Kerenskij), ke la disponoj, kiujn mi estis enkondukinta por subpremi la ribelon, „nur incitas la amasojn” kaj ke mi entute per „mia enmiksiĝo” „ĝenas la reprezentantojn de la soveta plimulto por fari sukcesajn intertraktadojn kun la bolŝevistoj cele al likvido de la ribelo”. Por kompletigi la bildon, Kerenskij aldonis, ke

> „Dan faris tiujn gravajn sciigojn en la momento, en kiu partoj de la armita 'Ruĝa Gvardio' ekokupis la publikajn konstruaĵojn. En la sama tempo, kiam Dan kun siaj amikoj forlasis la Vintran Palacon, en la Milionaja hejmvoje el kunsido de la provizora registaro la ministro Kartaŝev estis arestita kaj forkondukita en la Smolni, kien Dan revenis por daŭrigi la pac-intertraktadojn kun

> la bolŝevistoj. Oni devas agnoski, ke la bolŝevistoj procedis tre energie kaj ne malpli lerte. En la sama tempo, kiam la ribelo estis plene okazanta kaj la 'ruĝaj armeoj' agadis en la tuta urbo, kelkaj bolŝevistaj delegitoj, kiuj estis destinitaj por tio, provis, sukcese, ensorĉi la reprezentantojn de la 'revolucia' demokratio – kaj tiuj ja vidis, sed ili komprenis nenion, ili aŭdis, sed ili komprenis nenion. La debataj artistoj pasigis la tutan nokton intertraktante pri diversaj formuloj, kiuj laŭdire devis fariĝi la fundamento de la interkonsento kaj de la likvidado de la ribelo. Per tiu metodo de 'intertraktadoj' la bolŝevistoj gajnis multan tempon kaj la batalfortoj de la socialrevoluciuloj kaj de la menŝevistoj ne povis esti ĝustatempe mobilizitaj. Kio estis pruvenda!” (A. Kerenski: *Aus der Ferne* [El malproksimo], p. 197s.)

Kaj efektive: tio estis pruvenda. Kiel ni vidas el tiu prezentado, la oportunistoj estis komplete kaptitaj de la soveta leĝeco. La supozo de Kerenskij, ke la bolŝevistoj per apartaj delegitoj trompis la menŝevistojn kaj la socialrevoluciulojn, fakte ne estis ĝusta. En la realo en la intertraktadoj partoprenis tiuj bolŝevistoj, kiuj efektive deziris la likvidon de la ribelo kaj kiuj kredis la formulon de la socialista registaro, konsistanta el diversaj partioj. El objektiva rigardo tiuj parlamentanoj sendube faris certan servon al la ribelo, per tio ke per siaj propraj iluzioj ili nutris tiujn de la malamiko. Tamen ili povis fari tiun servon nur ĉar la partio ne lasis sin influi de iliaj konsiloj kaj avertoj kaj kun senŝanĝa energio kondukis la ribelon antaŭen kaj ĝis ĝia fino.

Por ke tiu larĝe aranĝita operacio povu esti venka, tute eksterordinaraj cirkonstancoj, grandaj kaj malgrandaj, devis kunefiki. Unue, armeo devis ekzisti, kiu jam ne volis partopreni en la milito. La revolucio, speciale en sia unua periodo, de februaro ĝis oktobro inkluzive, ricevintus tute alian vizaĝon, se ĉe ĝia eksplodo ni ne havus batitan, malkontentan, je milionoj fortan kampulan armeon. Nur sub tiu antaŭkondiĉo ni povis sukcese plenumi la eksperimenton kun la

petrograda garnizono, eksperimenton, kiu determinis la oktobran venkon. Oni ankaŭ eĉ ne povintus pensi pri ia ajn ligado de la „silenta”, preskaŭ ne rimarkita ribelo kun la defendo de la soveta leĝeco kontraŭ la kornilova puĉo. Inverse oni povas kun konvinko aserti, ke tia eksperimento en tiu formo neniam kaj nenie ripetiĝos. Tamen ĝia atenta studado estas nemalhavebla. Ĝi ampleksigas la vidan horizonton de ĉiu revoluciulo kaj montras al li la amplekson de la rimedoj kaj diversecon de la metodoj aplikeblaj kaj kiuj, se la celo staras klare antaŭ la okuloj, ĉiuj cirkonstancoj estas ĝuste pripensitaj kaj taksitaj, ĉe sufiĉa decidopovo, povas konduki la batalon al venko.

En Moskvo la batalo havis multe pli daŭran karakteron kaj postulis multe pli da viktimoj. Tio klariĝas el la fakto, ke la moskva garnizono ne estis submetita al tiom zorgema revolucia preparado kiom la petrograda, lige kun la demando de la forsendo de la trupoj al la fronto. Ni jam diris tion kaj devas ĝin ripeti, ke la armita ribelo en Petrogrado okazis en du etapoj: en la unua oktobra duono, kiam la petrogradaj regimentoj submetis sin al la ordonoj de la sovetoj, kio kongruis kun ilia propra mensostato kaj senpune ne plenumis la ordonojn de la supera armea gvidantaro, kaj en la 25-a de oktobro, kiam necesis jam nur eta instigo por senkatenigi la ribelon, kiu distranĉis la umbilikan ŝnuron de la februara registaro. En Moskvo la ribelo okazis en unu sola etapo, kio eble donas la ĉefan kaŭzon por ĝia hezitema karaktero. Sed ekzistis krome alia kaŭzo: la nedecidemo de la gvidantaro. En Moskvo ni povis observi, kiel la militaj operacioj estis transkondukitaj al intertraktadoj, kiuj tamen siavice estis anstataŭitaj de bataloj. Ŝanceliĝo de la gvidantaro fariĝas rimarkebla al la kondukatoj kaj estas danĝera ankaŭ en la politiko, ĉe armita ribelo ĉia nedecidemo efikas mortige. La reganta klaso jam perdas la konfidon en sia forto (sen kiu nenia venkespero povas ekzisti), sed la ŝtataparato troviĝas ankoraŭ en ĝia mano. La revolucia klaso havas la taskon konkeri la ŝtataparaton, por tio ĝi bezonas la konfidon en sia propra forto. Kiam la partio kon-

dukis la laborulojn sur la vojon de la ribelo, ĝi devas ankaŭ porti ĉiujn konsekvencojn. „En la milito okazas milite”. Tie, ŝanceliĝoj kaj malŝparoj de tempo malpli allaseblas ol aliloke. En la milito oni mezuras per mallongaj mezuriloj. Resti surloke, eĉ se nur por malmultaj horoj, signifas, ke oni redonas al la malamiko parton de lia memkonfido kaj forprenas ĝin de la revoluciuloj. Sed per tio tuŝiĝas la fortrilato, kiu decidas la rezulton de la batalo. El tiu vidpunkto oni devas rigardi la iradon de la militaj operacioj en Moskvo en ĝia rilato kun la politika gvidado.

Krome estus eksterordinare grave, reteni kelkajn punktojn, kie la interna milito okazis sub apartaj kondiĉoj, ekz-e komplikita de naciaj elementoj. Tia studado, surbaze de zorgema prilaborado de la faktomaterialo, devus tre riĉigi nian imagon pri la meĥaniko de la interna milito kaj samtempe faciligi la ellaboradon de certaj metodoj kaj reguloj, kiuj havu sufiĉe ĝeneralan karakteron por esti kunmeteblaj al speco de „regularo” de interna milito.[5] Kvankam hodiaŭ ŝajnas esti tro frue por voli fari iujn ajn konkludojn, tamen eblas diri, ke ekzemple la evoluo de la interna milito en la provinco dependis, kaj en grava mezuro, de la evoluo en Petrogrado, spite al la malpli granda rapido en Moskvo. La februara revolucio rompis la malnovan ŝtataparaton; la provizora registaro heredis ĝin, sed estis nekapabla renovigi aŭ firmigi ĝin. Laŭ tio, la ŝtataparato inter februaro kaj oktobro ekzistis nur pro la burokrata inercileĝo. La burokrata provinco kutimis direkti sin laŭ Petrogrado: tion ĝi faris en februaro, tio ripetiĝis en oktobro. Nia granda avantaĝo konsistis en tio, ke ni estis faligonta registaron, kiu apenaŭ estis trovinta tempon por konsistigi sin. La eksterordinara malkonstanteco kaj la manko de memkonfido ene de la aparato de la

5 Vidu *L. Trotzki, Probleme des Buergerkrieges* [L. Trocko: Problemoj de la interna milito], *Pravda*, n-ro 202, 6, septembro de 1924.

februara registaro faciligis nian taskon kaj vekis la memkonfidon de la revoluciaj amasoj kaj de la partio mem.

En Germanujo kaj Aŭstrujo la kondiĉoj post la 9-a de novembro 1918 estis similaj. Sed tie la socialdemokratio helpis al la respublika burĝa reĝimo defendi sin, per tio ke ĝi plenigis la breĉojn de la ŝtataparato, kaj kvankam tiu reĝimo absolute ne prezenteblas kiel ekzemplo de decidemo, tiu registaro tamen tenas sin jam dum ses jaroj. Koncerne la ceterajn kapitalismajn landojn, tiuj ne havos la avantaĝon de tiom densa tempa ligo inter la burĝa kaj la proletara revolucio. Ilia „februaro” estas jam longe pasinta. En Anglujo ja ekzistas multe da postrestinta feŭda rubaĵo, sed ne eblas paroli pri ia ajn propra burĝa revolucio. La purigo de la lando el la monarĥio, la lordoj k.a. fariĝos per la unua svingo de la balailo de la proletaro, ekde kiam ĝi konkeris la potencon. La proletara revolucio en la Okcidento devos alfronti komplete elkonstruitan burĝan ŝtataparaton. Sed tio ankoraŭ ne signifas kun firmigita ŝtataparato, ĉar la ebleco de proletara revolucio antaŭkondiĉas multe progresintan disfalprocezon de la kapitalisma ŝtato. Dum ĉe ni la Oktobra Revolucio disvolviĝis en la batalo kun ŝtataparato, kiu post la februaro ankoraŭ ne sukcesis solidiĝi, en la aliaj landoj la ribelo celos ŝtataparaton, kiu troviĝos en stato de progresa disfalo.

Oni povas akcepti kiel ĝeneralan regulon – ni jam prezentis ĝin dum la kvara kongreso de la Komunista Internacio – ke la forto de la antaŭoktobra rezistado de la burĝaro en la malnovaj kapitalismaj landoj ĝenerale estos multe pli forta ol ĉe ni, ke la venko de la proletaro estos multe pli malfacila, aliflanke al ĝi la konkero de la potenco tuj certigos al ĝi pli firman pozicion ol tiu, en kiun ni venis en la mateno post la Oktobro. Ĉe ni la interna milito fakte eksplodis nur post kiam la proletaro en la plej gravaj urbaj kaj industriaj centroj akiris la potencon, kaj tiam ĝi daŭris tri jarojn. Multo indikas, ke la konkero de la potenco en la centra kaj okcidenta Eŭropo estos ligita kun multe pli grandaj klopodoj, aliflanke la proletaro post la potencakiro havos

senkompare pli da agospaco. Estas memkompreneble, ke tiuj perspektivoj povas havi nur kondiĉitan karakteron. Tre multo dependos de tio, en kiu sinsekvo la revolucio okazos en la diversaj landoj de Eŭropo, kiaj eblecoj ekzistos por milita interveno, kian ekonomian kaj militan forton la Sovetunio en tiu momento posedos, k.a. Ĉiukaze tiu nia principa kaj laŭ nia opinio nerefutebla konsidero, laŭ kiu la procezo de konkero de la potenco en Ameriko kaj Eŭropo trafos sur multe pli grandan, multe pli trapensitan kaj pli obstinan rezistadon de la reganta klaso ol ĉe ni, devigas nin pritrakti la armitan ribelon kaj entute la internan militon efektive kiel arton.

## Refoje pri la sovetoj kaj la partio en la proletara revolucio

La sovetoj de la laboristaj deputitoj estiĝis same en la jaro 1905 kiel en 1917 el unu sama movado, kiel la natura organiza formo de la movado, sur certa batalŝtupo de ĝi. Sed por la junaj eŭropaj partioj, kiuj transprenis la sovetojn pli aŭ malpli kiel „doktrinon”, kiel „principon”, ĉiam ekzistas la danĝero de fetiĉa rilato al la sovetoj, per tio ke ili vidas ilin kiel memefikan faktoron de la revolucio. Senkonsidere la grandajn avantaĝojn de la sovetoj ĉe la organizado de la batalo por la potenco, tamen penseblas kazoj, en kiuj la ribelo fluigeblas sur alia bazo, per aliaj organizaj formoj (laborejaj konsilantaroj, sindikatoj) kaj nur en la plua evoluo de la ribelo aŭ eĉ post ĝia venko la sovetoj estiĝos, kaj tiam jam kiel organoj de la potenco.

Estas plej altgrade instrua rigardi el tiu vidpunkto la batalon, kiun Lenino komencis post la juliaj tagoj kontraŭ la fetiĉismo rilate la organizajn formojn de la sovetoj. Tiom, kiom la socialrevoluciaj kaj menŝevistaj sovetoj en julio fariĝis organizaĵoj, kiuj pelis la soldatojn al malkaŝa atako kaj strebis ekstermi la bolŝevistojn, tiom la revolucia movado de la laborantaj amasoj povis kaj devis serĉi novajn vojojn. Lenino atribuis al la entreprenaj konsilantaroj la funkcion de organizaĵoj de batalo por la potenco. Plej verŝajne la movado irintus tiun vojon, se ne la Kornilov-puĉo devigintus la oportunistajn sovetojn defendi sin kaj donintus al la bolŝevistoj la eblecon enspiri al la sovetoj novan revolucian vivon. Per la maldekstra alo, la bolŝevista, ili estis dense ligataj kun la amaso.

Kiel la plej novaj spertoj en Germanujo montras, la demando havas grandan internacian gravecon. Ĝuste en Germanujo oni plurfoje starigis la sovetojn kiel organojn de la ribelo – sen ribelo, kiel organojn de la potenco – sen potenco. Tio en la jaro 1923 instigis la larĝajn proletarajn kaj duonproletarajn amasojn grupigi sin ĉirkaŭ la entreprenkonsilantaroj. Tiuj principe plenumis ĉiujn tiujn funkciojn, kiuj ĉe ni en la tempo antaŭ la rekta batalo por la potenco estis transdonitaj al

la sovetoj. En aŭgusto kaj septembro kelkaj kamaradoj proponis, en Germanujo senprokraste komenci la fondon de sovetoj. Post longaj kaj ardaj debatoj tiu propono estis rifuzita. Tio estis absolute ĝusta. Ĉar la entreprenkonsilantaroj efektive fariĝis nodopunktoj de kunigo de la revoluciaj amasoj, la sovetoj en la prepara periodo estus senenhava paralela formo. Ili nur devojigus la atenton for de la praktikaj taskoj de la ribelo (armeo, polico, armitaj centopoj, fervojoj) en la direkton de la memefika organizoformo. Aliflanke la fondo de la sovetoj kiel sovetoj ĝis la momento de la ribelo kaj ekster la rektaj taskoj de la ribelo havintus la signifon de nenion diranta anonco: „Mi marŝas kontraŭ vi!” La registaro, kiu devis toleri la entreprenkonsilantarojn, se ili fariĝis kolektiĝejoj de grandaj amasoj, agnoskintus la unuajn sovetojn, ĉar ĝi estus vidinta en ili la oficialajn organojn por kapti la potencon. La komunistoj estus devigitaj defendi la sovetojn kiel puran organizan demandon. La decida batalo eksplodintus ne pro la kapto kaj defendo de realaj atingoj, nek en la momento elektenda de ni, nome kiam la ribelo reale kongruus kun la kondiĉoj de la amasmovado – ne, la batalo temintus pri la organizaj formoj, pri la „flago” de la sovetoj, kaj tio dum tempo, kiun la kontraŭulo elektus kaj trudus al ni. Sed estas tute klare, ke la tuta preparlaboro por la ribelo povis sukcese subordiĝi al la organizaj formoj de la entreprenkonsilantaroj, kiuj estis jam elkreskintaj al amasaj organizaĵoj, kiuj konstante kreskis je etendo kaj potenco kaj donis al la partio kompletan agliberecon koncerne la momenton de la ribelo. Estas klare, ke sur certa evoluŝtupo sovetoj devintus estiĝi. Sed estas dube, ĉu sub la supre prezentitaj kondiĉoj ili estiĝus kiel rektaj organoj de la ribelo. Ĉiukaze la danĝero ekzistis, ke en la fajro de la batalo formiĝis du revoluciaj centroj. „Oni ne saltu”, diras angla proverbo, „de ĉevalo al ĉevalo, kiam oni rajdas tra ŝiranta akvo.” – Eble la sovetoj estiĝus ĉie post la venko en la decidaj punktoj de la lando. Ĉiuokaze venka ribelo estus nepre kondukinta al kreado de la sovetoj kiel organoj de la potenco.

Oni ne forgesu, ke la sovetoj estiĝis ankoraŭ en la „demokratia” etapo de la rusa revolucio, ke ili estis laŭleĝigitaj, ke ili poste transiris al ni kaj estis utiligataj de ni. Tio ne ripetiĝos en la proletaraj revolucioj de la Okcidento. Tie la sovetoj en la plej multaj kazoj estiĝos laŭ instigo de la komunistoj, sekve kiel rektaj organoj de la proletara ribelo. Estas vere, ke ekzistas la ebleco ke la disfalo de la burĝa ŝtataparato estos sufiĉe progresinta, antaŭ ol la proletaro kapablos akiri la potencon, kaj ke tiam estiĝos kondiĉoj por kreado de sovetoj kiel *evidentaj organoj de preparo de la ribelo*. Tiu fenomeno certe ne estos ĝenerala. Ankaŭ verŝajnas kazoj, en kiuj la sovetoj kreeblas nur en la plej lastaj tagoj kiel rektaj organoj de la batalo de la leviĝantaj amasoj. Fine penseblas ankaŭ tiaj kondiĉoj, kie la sovetoj estiĝos nur post la ribelo, kaj eble eĉ en ĝia fina fazo, kiel organoj de la nova potenco. Oni devas havi antaŭ siaj okuloj ĉiujn ĉi variaĵojn, por ne fali en la organizaĵfetiĉismon kaj formi la sovetojn ne alie ol laŭcelaj, kiel fleksiĝeman, vivantan batalformon kaj ne kiel organizan principon, kiu penetras en la partion kaj ĝenas ties naturan evoluon.

Lastatempe en nia gazetaro oni multe parolis pri tio, ke ni ekzemple ne vere scias, tra kia pordo en Anglujo la proletara revolucio venos: ĉu tra la komunista partio aŭ tra la sindikatoj. Tia formulado de la demando, kiu ŝajne antaŭkondiĉas larĝan historian horizonton, estas malĝustega kaj danĝera, ĉar ĝi forviŝas la ĉefan instruon de la lastaj jaroj. La fakto, ke ĉe la militkomenco ne ekzistis venka revolucio, ŝuldiĝas al la fakto, ke neniu partio ekzistis. Tio asserteblas pri la tuta Eŭropo. Eĉ pli konkrete oni povas konvinkiĝi pri tio ĉe rigardo de la sorto de la revolucia movado en la unuopaj landoj. Koncerne Germanujon, la situacio tie estas tute klara: la germana revolucio povintus venki en 1918 kaj 1919, se ĝi disponintus pri taŭga partia gvidantaro. En 1917 ni vidis la samon ĉe la ekzemplo de Finnlando: tie la revolucia movado evoluis sub aparte favoraj kondiĉoj sub rekta milita kunagado de la revolucia Ruslando. Sed al finna partio, kies gvida plimulto estis

socialdemokrata, montriĝis nekapabla kaj fiaskigis la revolucion. Ne malpli klare tiu instruo rezultas ankaŭ el la sperto de Hungarujo. Tie la komunistoj kune kun la maldekstra alo de la socialdemokrataro ne konkeris la potencon, sed ricevis ĝin de la timigita burĝaro. La hungara revolucio, kiu venkis ja senbatale, ekde sia unua paŝo estis sen ajna gvido. La komunista partio dissolviĝis en la socialdemokratan kaj per tio dokumentis, ke ĝi mem ne estis komunista partio, sekve ankaŭ ne kapabla, spite al la batalspirito de la hungaraj proletoj, konservi la potencon tiom facile alfalintan al ĝi. Sen la partio, per ĉirkaŭiro de la partio, per surogato de la partio, la proletara revolucio ne povas venki. Jen la ĉefa instruo de la lasta jardeko. Ĝustas, ke la anglaj sindikatoj fariĝas potenca centro de la proletara revolucio kaj ekzemple sub certaj kondiĉoj kaj por certa tempo povas eĉ anstataŭi la laboristajn konsilantarojn. Sed ili ne povas ludi tian rolon sen la Komunista Partio kaj eĉ malpli kontraŭ ĝi, sed nur sub la kondiĉo, ke la komunista influo en la sindikatoj fariĝas decida. Ni devis tro multekoste akiri la ekkonon pri kian rolon la partio havas por la proletara revolucio, por facile forlasi ĝin aŭ por eĉ nur malfortigi ĝian gravecon.

La celkonscio kaj la laŭplaneco en la burĝaj revolucioj ludis senkompare malpli gravan rolon, ol ili nun en la proletaraj revolucioj devas ludi kaj jam ludis. La pelforto ankaŭ tie estis la amaso, kiu tamen estis signife malpli organizita kaj malpli konscia ol nuntempe. La gvidado troviĝis en la manoj de diversaj frakcioj de la burĝaro, kiu disponis pri riĉaĵo kaj klereco kaj pri la organiziteco rezultantaj el tiuj avantaĝoj (urboj, universitatoj, gazetaro). La burokrata maŝino defendis sin empirie, ĝi procedis palpante. La burĝaro sciis uzi la momenton, en kiu ĝi povis utiligi la movadon de la malsuperaj tavoloj, por ĵeti ties socian pezon en la pesilon kaj konkeri la potencon. La proletara revolucio distingiĝas ĝuste per tio, ke en ĝi la proletaro estas ne nur la pelanta forto, sed per ĝia avangardo ankaŭ la gvida forto. La rolo, kiun en la burĝaj revolucioj ludis la ekonomia potenco de la burĝaro, ties

klereco, ties urbaj administracioj kaj universitatoj, en la proletara revolucio povas esti nur tiu de la partio de la proletaro. La graveco de tiu rolo estas des pli granda, ĉar ankaŭ la konscio de la kontraŭulo senmezure kreskis. La burĝaro en la fluo de la jarcentoj, dum kiuj ĝi dominis, trairis politikan lernejon, kiu taksendas senkompare pli alte ol la lernejo de la malnova burokrata monarĥio. Se la parlamentismo estis por la proletaro preparo por la revolucio, ĝi estis por la burĝaro certagrade kaj en eĉ pli alta mezuro lernejo de kontraŭrevolucia strategio. Sufiĉas indiki, ke la burĝaro per la parlamentismo edukis la socialdemokration, kiu hodiaŭ estas la ĉefa apogo de la privata proprieto. La epoko de la socia revolucio en Eŭropo, kiel la unuaj paŝoj montris, estos tempo de streĉa, senkompata, sed trapensita kaj mature eltaksitaj bataloj – trapensitaj en multe pli alta grado ol ĉe ni en la jaro 1917.

Ĝuste pro tio necesas aliri la problemojn de interna milito kaj speciale de la armita ribelo tute alie ol ĝis nun okazis. Kun Lenino ni ofte ripetas la vortojn de Markso, ke la ribelo estas arto. Sed tiu penso fariĝas malplena frazo, se oni al la formulo de Markso ne samtempe donas enhavon per studado de la bazaj elementoj de la arto de interna milito surbaze de la gigantaj spertoj, kiujn ni akumulis en la lastaj jaroj. Necesas emfazi, ke en supraĵa konduto pri la armita ribelo esprimas sin la ankoraŭ ne superita forto de la socialdemokrata tradicio. La partio, kiu traktas la demandojn de interna milito facil-anime, supozante, ke en la decida momento la okazaĵoj ordiĝas kaj formiĝas kvazaŭ per si mem, nepre suferos malvenkon. Ni devas kune tralabori la spertojn de la proletaraj bataloj, ekde 1917.

La supre aludita historio de la partiaj grupiĝoj en la jaro 1917 estas ankaŭ tre grava parto de la spertoj de la interna milito kaj, kiel ni supozas, havas rektan gravecon por la politiko de la komunista inter-nacio kiel tutaĵo. Ni jam supre menciis kaj ripetas, ke la studado de la esplorado de la opinidiferencoj neniakaze rigardeblas kvazaŭ tio

direktiĝus kontraŭ la kamaradoj, kiuj defendis malĝustan politikon. Sed aliflanke estus ne allasebla, se oni el la historio de la partio volus forstreki la plej grandan ĉapitron, nur ĉar ne ĉiuj membroj de la partio tenis la paŝon kun la proletara revolucio. La partio devas kaj rajtas koni sian tutan pasintecon, por ke ĝi povu ĝuste taksi ĝin kaj atribui al ĉia okazaĵo la ĝustan lokon. La tradicio de revolucia partio formiĝas ne per prisilentado, sed ĝuste inverse, per kritika klareco.

La historio certigis al nia partio tute eksterordinarajn revoluciajn avantaĝojn. La tradicio de la heroa batalo kontraŭ la carismo, la kutimoj de la revolucia abnegacio, kiu estas dense ligita kun la kontraŭleĝa agado – teoria prilaborado de la revoluciaj spertoj de la tuta homaro – la batalo kun la menŝevismo – la batalo kun la 'narodniki' – la batalo kun la oportunistaj tendencoj – la gigantaj spertoj de la revolucio de la jaro 1905 – la teoria tralaborado de tiuj spertoj en la jaroj de la kontraŭrevolucio – la aliro al la problemoj de la internaciaj laboristaj demandoj el la starpunkto de la revoluciaj instruoj de la jaro 1905 – tio estis tio, kio en sia tutaĵo donis al nia partio eksterordinaran firmecon, la plej grandan teorian sagacon kaj senekzemplan revolucian impeton. Kaj malgraŭ tio, ankaŭ en tiu ĉi partio en ĝia pinto, rekte antaŭ la decida ago, apartiĝis grupo de spertaj revoluciuloj, de malnovaj bolŝevistoj, kiu poziciiĝis en plej akra opozicio al la proletara ribelo kaj kiu en la plej kriza periodo de februaro 1917 ĝis proksimume februaro 1918 en ĉiuj gravaj demandoj alprenis envere socialdemokratan starpunkton. Por savi la partion kaj la revolucion kontraŭ la plej granda konfuzo, kiu rezultis el tiuj cirkonstancoj, necesis la jam tiutempe senekzempla influo de Lenino en la partio. Tion ni nepre ne forgesu, se ni volas, ke la komunistaj partioj de la ceteraj landoj lernu de ni. La problemo de elekto de la gvidaj personoj en la partio estas tre grava por la okcidenteŭropaj ŝtatoj. Tiurilate vere krianta estas la sperto de la maltrafita germana oktobro 1923. Sed tiu elekto devas okazi el la vidpunkto de la revolucia ago. En Germanujo en la lastaj jaroj ekzistis sufiĉe da

kazoj de ekzamenado de la gvidaj membroj de la partio en la momento de la rekta batalo. Sen tiu kriterio ĉio cetera estas nefidinda. Francujo en tiuj ĉi jaroj estis esence pli malriĉa je revoluciaj skuoj, eĉ je nur partaj. Malgraŭ tio ne mankis kelkaj eksplodoj de interna milito, ĉe kiuj la Centra Komitato de la partio kaj la gvidantoj de la sindikata organizaĵo devis agoforte reagi al neprokrasteblaj brulantaj demandoj (ekzemple la sanga kunveno de la 11-a de januaro 1923). La atenta studado de tiaj krizaj situacioj donas bonegan materialon por pritaksi la partian gvidadon, la pozicion de la unuopaj organoj de la partio kaj de la unuopaj aktivaj partianoj. Ignori tiajn instruojn, ne apliki ilin ĉe la elekto de la gvidantoj, signifus iri al neevitebla malvenko. Sen decidema, brava partigvidado la venko de la proletara revolucio ne penseblas.

Ĉiu partio, eĉ la plej revolucia, neeviteble disvolvas organizan konservativismon, alie ĝi ne povus montri la necesan firmecon, kiun ĝi nepre bezonas. Ĉe revolucia partio la necesa dozo de konservativismo devas esti kunigita kun kompleta libereco el la rutino, kun libereco de orientiĝo kaj kun agoforta impeto. Oni povas plej akre kontroli tiujn ecojn ĉe la turnopunktoj de la historia evoluo. Jam pli frue ni menciis la vorton de Lenino, ke kelkfoje eĉ la plej revoluciaj partioj en akra ŝanĝo de la kondiĉoj kaj ĉe la problemoj estiĝantaj el tio, daŭre plu paŝas sur la malnova vojo kaj per tio fariĝas bremso de la revolucia evoluo aŭ estas en danĝero fariĝi tia. Same la konservativismo de partio kiel ĝia revolucia iniciato trovas sian plej koncentritan esprimon en la organoj de la partia gvidantaro. Sed la eŭropaj komunistaj partioj ankoraŭ staras antaŭ la plej akra „ŝanĝiĝo”: la transiro de la prepara laboro al la konkero de la potenco. Tiu ŝanĝo estas la plej malfacila, la plej urĝa, la plej respondeca, la plej serioza. Maltrafi tiun momenton estus la plej granda malvenko, kiu entute povus okazi al la partio.

La sperto de la eŭropaj, kaj antaŭ ĉio de la germanaj bataloj de la lasta jaro, vidata el la lumo de niaj propraj spertoj, diras al ni, ke ekzistas

du specoj de gvidantoj, kiuj emas haltigi la partion, kaj ĝuste en la momento, en kiu ĝi devas fari la plej gravan paŝon antaŭen. La unuaj emas vidi sur la vojo de la revolucio precipe malfacilaĵojn kaj malhelpojn, kaj rigardas ĉiun kun la intenco – kvankam ne ĉiam konscia –, eviti la agon. La marksismo servas al ili nur por pravigi la maleblon de la revolucia ago. En la rusaj menŝevistoj ni vidas tiun specon en elstara maniero. Tiu tipo per si mem ne ekzistas nur en la menŝevismo, sed en la plej kriza momento ĝi aperas en respondeca posteno ankaŭ en la plej revoluciaj partioj. La reprezentantoj de la alia tipo distingas sin per sia supraĵa agiteca karaktero. Ili nenie vidas malhelpojn, tiom longe kiom ili ne puŝiĝas per la kapo kontraŭ muro. Ili transsaltas ĉiajn malfacilaĵojn kaj havas grandan lertecon ĉirkaŭiri realajn malhelpojn per lertaj parolturnoj. En ĉiuj demandoj ili montras la plej grandan optimismon, kiu neeviteble transformiĝas en sian malon, ekde kiam venis la horo de la decida ago. Por la unua tipo, la etkreda revoluciulo, la malfaciloj de la potencakiro konsistas nur en la amasigo kaj grandigo de tiuj malfacilaĵoj, kiujn li kutimas rigardi. Por la dua tipo, la supraĵa optimisto, la malfacilaĵoj ĉiam estiĝas tute neatendite. En la prepara tempo la konduto de tiuj du estas malsama, la unua estas skeptika kaj oni ne povas tre fidi lin en la revolucia senco, kompense la alia povas aperi kiel la nebridebla revoluciulo. En la decida momento ambaŭ iras man-en-mane kaj kontraŭstaras la ribelon. Kaj tamen la tuta preparlaboro havas valoron per tio ke ĝi donas al la partio kaj unuavice al ĝiaj gvidaj organoj la eblecon determini la momenton de la ribelo kaj gvidi ĝin. Ĉar la tasko de la komunista partio estas la konkero de la potenco, kun la celo transformi la socion.

Lastatempe oni ofte parolis kaj skribis pri la neceso „bolŝevismigi” la komunistan internacion. Tio estas sendube tre grava tasko, kiu speciale post la kruelaj spertoj en Germanujo kaj Bulgarujo fariĝis neprokrastebla. La bolŝevismo ne estas doktrino (pli ĝuste: ne nur

doktrino), sed sistemo de revolucia edukado por la proletara ŝtatrenverso. Kion signifas tio, la bolŝevismigo de la komunistaj partioj? Tio signifas: tian edukadon kaj tian elektadon de la gvidantoj, ke ili en la momento de sia Oktobra Revolucio ne misu. „*Tio estas Hegelo kaj libra saĝo kaj la senco de ĉia filozofio!*”

PROOF

# Postparolo de la tradukinto

Tiu ĉi teksto ne estas iu el la multaj omaĝaj elvokoj, per kiuj la komunista movado dum la stalina kaj poststalina tempo ĝis nuntempe pli aŭ malpli regule celebras tiun grandan eventon, la Oktobran Revolucion, sed ĝia provizora analizo kun la celo eltiri utilajn instruojn el ĝi, verkita de tiu homo, kiu plej elstare teorie kaj praktike estis organizinta ĝin, do temas pri analizo farita de la plej kompetenta persono mem.

En tiu ĉi eseo, verkita en la jaro 1924, do okaze de la kvinjariĝo de la Oktobra Revolucio, Trocko analizas la kondiĉojn de tiu granda revolucio – kiun li nomas ŝtatrenverso, revolucio, kaj ankaŭ eksperimento – por eltiri instruojn por la rusaj kaj alilandaj marksistoj. Sed li samtempe kritikas la foreston de raportaj aŭ analizaj tekstoj pri tiu revolucio en la lando de tiu revolucio mem. Trocko ne nomas kaŭzantojn aŭ eĉ kulpulojn pri tiu manko, insistante pri la principo, ke personaj opinidiferencoj dum la koncernaj momentoj ne servu kiel preteksto por prisilenti la revolucion mem. Jen li skribas (paĝo 8):

> „Ja eblas indiki, ke maleblas studi la Oktobron aŭ eĉ nur eldoni la dokumentan materialon, sen supren kirli malnovajn opinidiferencojn. Sed tia sinteno al tiu ĉi demando estus tro etanima. Kompreneble la opinidiferencoj en la jaro 1917 estis tre profundaj kaj tute ne hazardaj. Sed estus etanime, se nun, post kiam kelkaj jaroj pasis, oni volus forĝi armilojn kontraŭ tiuj, kiuj tiam eraris. Sed eĉ malpli allasebla estus, se pro tiuj subordigitaj konsideroj de persona karaktero oni volus prisilenti la plej gravajn problemojn kun internacia graveco de la oktobra renverso.”

Sed la postaj eventoj ja montras, ke Stalino, kiu mem ne ludis rolon en la Oktobra Revolucio, faris ĉion eblan kaj principe maleblan por estingi Trockon kaj lian rolon en la revolucia movado el la komuna memoro. Elvoki la Oktobran Revolucion honeste ne eblis sen nomi Trockon kiel la elstaran aganton apud Lenino kaj sen ke aperu la malelstara rolo de Stalino en ĝi. Eviti tion do signifis eviti la okupiĝon

pri la Oktobra Revolucio kaj tie, kie tio ne eblis, limigi sin al pli aŭ malpli interesaj solenaĵoj.

Por la sovetia socio same kiel por la internacia komunista movado la sistema ignorado de tiuj ĉi trockaj konsideroj kaj la ne okazinta diskuto pri ili kaŭzis konsiderindan damaĝon. Nuntempe, okaze de la centjariĝo de la Oktobra Revolucio, ili povas servi por pli bone kompreni ne nur tiun eventon mem, sed ankaŭ la evoluon de la Sovetunio ĝis ĝia kolapso[6] kaj samtempe por fruktodone diskuti pri tiuj ĉi ekkonoj, kiuj estas valoraj ne nur por komunistaj partioj, sed por progresemaj movadoj ĝenerale – ekz-e pri „normalaj" streĉiĝoj en la partio (aŭ en ajna progresema movado) ĉe subitaj historiaj turnopunktoj, pri la rolo de konservativismo kaj revoluciismo en la partio, ktp, por vidi, ĉu – kaj eble kiom – ili povas esti utilaj por la aktualaj kaj estontaj klopodoj de la laboruloj por sia emancipiĝo kaj por novaj provoj starigi senklasan mondon.

Havano, en oktobro de 2017
*Vilhelmo Lutermano*

6 Vidu pri tio la ĵus aperintan libron Theodor Bergmann: Strukturproblemoj de la komunista movado. Erarvojoj – kritiko – novigo. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2017, 302 paĝoj, ISBN 978-2-36960-095-4 (= MAS-libro n-ro 186).

Enpaĝigita de la Monda Asembleo Socia (MAS) en paperformato 14 · 21,6 cm, kun marĝenoj ĉiuflanke de 2,00 cm, per LibreOffice 4.4.6.3 kaj litertiparoj Liberation Serif 10 (teksto kaj citaĵoj) kaj 9 punktoj (piednotoj), sub Linukso Ubuntu

Presita en Britujo en la jaro 2017

PROOF

PROOF

PROOF

9 782369 600961

**Tiu ĉi teksto ne estas iu el la multaj omaĝaj elvokoj, per kiuj la komunista movado dum la stalina kaj poststalina tempo ĝis nuntempe pli aŭ malpli regule celebras tiun grandan eventon, la Oktobran Revolucion, sed ĝia provizora analizo kun la celo eltiri utilajn instruojn el ĝi, verkita de tiu homo, kiu plej elstare teorie kaj praktike estis organizinta ĝin, do temas pri analizo farita de la plej kompetenta persono mem.**

**Aktivuloj de la plej diversaj nuntempaj progresemaj movadoj rimarkos kun surprizo, kiom da sagacaj rimarkoj en tiu ĉi analizo priskribas la situacion de iliaj propraj grupoj.**

**La aŭtoro mem diras, ke la Oktobra Revolucio estos neniam kaj nenie ripetebla, sed la spertoj, kiujn la bolŝevistaj gvidantoj tiam kolektis, ne estas malutilaj por progresemuloj de hodiaŭ.**

ISBN 978-2-36960-096-1

9 782369 600961